JARO I JULIO 1910 Nro 3

# INTERNACIA PEDAGOGIA REVUO

OFICIALA ORGANO DE LA

INTERNACIA ASOCIO DE INSTRUISTOJ

LA ENHAVO: J. Krumpholc: Malnova portreto de Comenius. — A. Ferrière-J. W. Eggleton: Kunedukado. — Stan. Tomič: Principoj de edukado de l' volo. — La Grafo Vay de Vayja-M. J. Wessel: La gepatroj kaj la edukado de la japana infanaro en la familio. — N. Moesgaard: La nordiaj instruistkongresoj. — Prof. Kiuichi Nohara: Lernejo kaj instruisto en Japanujo. — M. Timuŝ: La popolaj lernejoj en Rumanujo — Felix Uhlmann: Lernejo kaj instruisto en Saksujo. — Inspektoro Jos. Anschau: La popola lernejo en Kroatujo. — Joh. Jacobs: Tria internacia kongreso por la familia edukado de la infano. — Al. Halamasek: Salajroj de instruistoj en Mal. Aŭstrio. — Jos. Albagés: Protokolo pri la kunvenoj de I. A. I. en Barcelona. — Novaj membroj de I. A. I. — Adresaro por nstruistoj.

---

**Internacia Asocio de Instruistoj (I. A. I.)**: Honora prezidanto: Dro E. Boirac, rektoro de la universitato, Dijon (Francujo). — Prezidanto: Th. Cart, profesoro de la franca universitato en Paris. — Vicprezidantoj: F. Maréchal, profesoro en Leeds (Anglujo), frl. C. de Chalmot en Koeln (Germanujo), R. Frenkel, inspektoro de gimnazio en Enisejsk (Siberio). — Sekretario: F. Durieux, direktoro de lernejo en Lille (Francujo). — Kasisto: Th. Čejka, instruisto en Bystřice-Hostýn (Aŭstrio).

Membra kotizaĵo por 1 jaro 1 Sm (2·50 aŭstriaj kronoj) estu sendata per poŝta mandato aŭ per 10 poŝtaj »respond-kuponoj« (kun la poŝta stampaĵo!) al la kasisto. — **Membroj de I. A. I. ricevas la oficialan organon senpage.**

② INTERNACIA PEDAGOGIA REVUO
REDAKCIO: *Th. Čejka*, Bystřice-Hostýn, Moravio (Aŭstrio).
ĈEFAJ KUNLABORANTOJ: *J. W. Eggleton, R. Frenkel.*

**KORESPONDANTOJ.**

**Anglujo**: Prof. Maréchal, G. R. Mills. — **Aŭstrio**: Prof. R. Fridrich, J. Krumpholc. — **Belgujo**: Joh. Jacobs. — **Danujo**: N. Moesgaard, P. Zoffmann. — **Finnlando**: Emil Elenius. — **Francujo**: F. Durieux, A. Germaine. — **Galicio**: J. Kaszycki. — **Germanujo**: Felix Uhlmann, K. Schönherr. — **Hispanujo**: Jos. Albagés. — **Italujo**: Prof. Alessandro Mazzolini. — **Japanujo**: Kiuichi Nohara. — **Malsupra Aŭstrio**: Al. Halamasek. — **Montenegro**: Risto M. Popovič-Čupič. — **Moravio**: J. Grňa, J. Holub. — **Nederlando**: Dreves Uitterdijk, M. J. Wessel. — **Norvegujo**: Nils Økland. — **Polujo**: B. Głuchowski, Fr. Solarski. — **Portugalujo**: G. M. Sarmento, prof. de normala lernejo. — **Rumanujo**: M. Timuŝ. — **Rusujo**: M. Beregavsky, Vlaso Kuročkin, inspektoro. — **Serbujo**: Jov. P. Jovanovič. — **Skotlando**: Ch. T. Macgregor, Thomas A. Maxwell. — **Svedujo**: J. Hammarlund, E. G. Risberg. — **Svisujo**: G. Stroele. — **Turkujo (Azia)**: J. Guéron.


---

**Redakcio kaj administracio** de la I. P. R. troviĝas en *Bystřice-Hostýn, Moravio, Aŭstrio.* — Jara abono por nemembroj de la I. A. I. = 1·5 Sm. Oni pagu per poŝta mandato aŭ per 10 poŝtaj »respond-kuponoj« (kun la poŝta stampaĵo!). — Poŝtaj markoj *ne estas* akceptataj por la pago de l' abono aŭ membra kotizaĵo.

---

**Respondo al kelkaj personoj,** kiuj postulis, ke nia I. P. R. estu redaktata aŭ ekskluzive aŭ almenaŭ parte en la »simpligita« Esperanto: Karaj kolegoj, ĉu ni instruistoj havas tiom da libera tempo, ke ĝi povus sufiĉi al ni ankaŭ por tiel senutila ludado kiel estas la konstanta elpensado kaj ĉiama ŝanĝado de novaj kaj pli novaj sistemoj de »helpa lingvo internacia«? Mi estas certa, ke mi parolas en la nomo de $99^{99}/_{99}\%$ de la membroj de I. A. I., se mi diras, ke Esperanto »nesimpligita«, t. e. tia, kiel ĝin kreis la genia Dro Zamenhof, jam sufiĉe klare kaj evidente pruvis al ĉiu vera amiko de la ideo de helpa lingvo internacia, ke ĝi taŭgas perfekte por ĉiuj bezonoj de nia nuna vivo. Ni bonege komprenas unu la alian kaj mi pensas, ke tio ĉi estas la ĉefa eco de helpa lingvo internacia. Nia vivo estas mallonga, precipe la vivo de instruisto, kaj tial ni ne deziras ludi, sed labori, labori serioze kaj energie pri niaj aferoj profesiaj. Oni ne forgesu, ke nia Asocio estas organizaĵo profesia, kuniĝo de instruistoj-profesiistoj kaj kompreneble, ke la saman tendencon havas ankaŭ nia revuo Por nia revuo, kiel gazeto pure profesia, la lingvo internacia ne povas esti celo, sed nur rimedo. Tial mi neniam dediĉos eĉ unu linion al la disputoj aŭ pri Esperanto aŭ pri la ideo de lingvo internacia entute. Ekzistas ja sufiĉe granda nombro da propagandaj ga-

B. Głuchowski
Raków



# La malnova artista portreto de J. A. Comenius.

La konata komeniologo Dro J. Kvačala, profesoro de la universitato en Jurjev (Dorpat, Rusujo), atentigis antaŭ kvar jaroj publikon slovakan (en Hungario)[1] kaj nelonge ankaŭ publikon ĉeĥan[2] kaj sciencan[3] pri belega, ĝis nun nekonata artista portreto de glora instruisto de instruistoj kaj apostolo de paco kaj artefarota lingvo internacia — J. A. Comenius, kiun portreton aĉetis an la j. 1905 la amsterdama „Rijks-Museum“ en tiea vendejo „de brakke Grand“.

---

[1] »Národnie Noviny«, Turč. Sv. Martin, 1905, Nro 112. — [2] »Komenský«, Zábřeh 2, Moravio, 1909, Nro 28. — [3] »Analecta Comeniana«, Jurievi, 1909, pĝ. V.

Ni publikigas kopion de tiu portreto, por ke oni alveninte Amsterdamon sciu pri ĝi kaj povu ĝojigi sin per ĝi, kaj por ke la kono pri ĝi disvastiĝu en la mondo . . .

La portreto tute certe meritas tion. Laŭ la opinio de prof. Kvačala ĝi estas pentraĵo de iu glora majstro holanda eble el la j. 1660, do unu el la plej malnovaj portretoj de Comenius, kiujn ĝi ĉiujn superas. Sufiĉas kompari nian kopion kun konataj bildoj de Comenius el la j. 1642 (angla gravuraĵo), 1652, 1657 (en la libro „Opera didactica"), 1658 (en „Vestibulum") kaj kun pentraĵo de Crispin el Passa el la j. 1666 ktp., kaj oni ekvidos, ke nia portreto estas el ĉiuj la plej artista kaj tial certe ankaŭ la plej bona.

Sur la originalo de nia kopio estas Comenius pentrita en nigra mantelo kun ruĝa, ore trateksita bordero, kaj lia estiminda kapo kun vivaj okuloj, helaj haroj kaj griza barbo influas per neforgesebla impreso de viva, bonanima vizaĝo.

Estus certe tre interese kaj merite trovi la devenon de tiu ĉi eminenta verko — la nomon de pentristo, jaron de origino kaj similajn detalaĵojn. Eble iu el niaj holandaj, respektive amsterdamaj geamikoj povus oferi al tiu ĉi afero iom da tempo kaj laboro, se ne el scienca, do almenaŭ el nacia intereso.*

*Jos. Krumpholc.*

# Kunedukado.

De *A. Ferrière*, Genève (Svisujo).

La demando pri kunedukado estas en la aero. Samtempe kun la konstantaj progresoj, kiujn faras la psikologio pedagogia, oni konscias pli kaj pli klare la malutilojn, eĉ la danĝerojn de unuflanka edukado, de edukado, kiu traktas ĉiun sekson aparte kaj ĉiam evitas, ke knaboj kaj knabinoj iel ajn pliproksimiĝu unu al alia. Ĉe la antaŭ nelonge okazinta en Londono internacia kongreso pri edukado, pli ol unu estro de kunedukada internulejo venis atesti, pro propra konvinkiteco, pri la utileco de tiu edukmaniero.

Per ĉi tiu artikolo ni deziras esplori la demandon laŭ vidpunkto speciala kaj por praktika celo. Ni lasos flanke la kunedukadon en unuagradaj lernejoj, kiel ankaŭ tiun, kiu fariĝas sur la benkoj de la universitato; ĉi tiuj du formoj troviĝas realigitaj preskaŭ ĉie, kaj pri ili oni jam plu ne disputas. Ni ankaŭ ne pritraktos la kunedukadon en eksterulejoj. Ni scias, ke jam pli ol unu

* Ilustritaj poŝtkartoj kun la portreto de Comenius estas riceveblaj en nia administracio po 10 heleroj (0·04 Sm.).

lando malfermis siajn duagradajn lernejojn, ĉu publikajn aŭ privatajn, por infanoj de ambaŭ seksoj. Enketo, kiun ni mem faris en Italujo, ebligis al ni konstati, pri ĉi tiu punkto, absolutan kontentecon de la estroj de publikaj lernejoj kaj de la lernantoj de l' du seksoj. Ankaŭ en Svisujo disvastiĝas la principo de la geknaba eksterulejo. En Berno, ĝia enkondukiĝo en la du oficialajn kolegiojn kaj en la Lerber'an lernejon ne okazigis eĉ la plej malgrandan kontraŭparolon. En Laŭsano, la Vittoz'a lernejo estas geknaba. Eĉ la kolegio de Ĝenevo, antaŭ du jaroj, malfermis sian pordon por la virina elemento; kaj ŝajnas, ke ĉi tiu novaĵo estas favore akceptita de la opinio ĝenerala.

Sed, apudekzistantaj kun la eksterulejoj, troviĝas, laŭ fatala leĝo, la internulejoj. Eĉ ŝajnas ja, kvazaŭ la rolo de tiuj ĉi institucioj fariĝas niatempe ĉiam pli kaj pli vasta, ĉar por multaj gepatroj neebligas iliaj cirkonstancoj, ke ili mem eduku siajn infanojn. Nu, la kazernsimila internulejo kaj la monaĥina lernejo estas sociaj pestoj. Tiun ĉi juĝon konfirmas ja preskaŭ unuanime la lernejestroj kaj la pli seriozaj lernantoj tie enkazernitaj. Absolute necese estas fari kontraŭagadon. Sed kiel?

Ni vidas nur unu elirvojon el ĉi tiu stato de aferoj. Ĝi postulas du novigaĵojn: 1. Plibonigi la eksterajn kondiĉojn de enedukeja vivado; por tiu celo transloki la internulejojn sur la kamparon kaj submeti ilin al la reĝimo higiena kaj morala de la „novaj lernejoj". 2. Enkonduki en ilin la kunedukadon de la seksoj.

Kunedukado de la seksoj en la internulejoj? Ĉu tio estas efektivigebla? Ĉu ĝi estas dezirinda?

Ĝuste ĉi tiujn demandojn ni volas tre mallonge respondi. Por eviti detalaĵojn, ĉi tie neĝustlokajn, ni donos nek citatojn nek referencojn. Tamen niaj certigoj estos, ne malpli pro tio, la frukto de serioza dokumentado. Studinte la kunedukadon el vidpunkto psikologia, kaj zorge esplorinte, laŭ raportoj de iliaj estroj kaj estintaj lernantoj, la procedojn kaj rezultatojn de kunedukado en la plimulto da nunekzistantaj institutoj kunedukadaj, ni ankaŭ faris, antaŭ nelonge, viziton en nova lernejo kunedukada, kiu estas, verŝajne, la plej bona el ĉiuj niatempe troveblaj: ni aludas ĉi tie la new school de Bedales en Anglujo.

Fondita en 1893 de J. H. Badley, geknaba jam de 1899 la lernejo de Bedales nun kalkulas proksimume cent knabojn kaj duone tiom da knabinoj. Ĉiujare venadas ĝin viziti, en granda nombro, pedagogoj el Eŭropo kaj Ameriko, ĉar ĝi sendispute reprezentas tipon de lernejo tre proksiman al la perfekteco. Tie, ni rapidu ĝin diri, oni ne komprenas la kunedukadon kiel integralan egal-

rajtan kulturigon de la du seksoj. Agante laŭ tia principo, oni submetus la knabojn al reĝimo tro milda aŭ la knabinojn al reĝimo tro severa. Virinigi la knabojn, tio ja estas danĝero ne malpli granda ol virigi la knabinojn. Ke ĉiu sekso ricevu edukon, kiu, estante konforma al ĝiaj fakultoj, ĝin ankaŭ preparas por la aparta rolo, kiun ĝi ludos poste en la vivo, sed ke ĉio fariĝu komune, kio estas komune farebla: jen la unua principo de vera kunedukado.

La utiloj, kiuj rezultas el la kunedukado, estas ordigeblaj laŭ du klasoj: aŭ ili estas negativaj, aŭ ili estas pozitivaj. Ili estas negativaj en la senco, ke ĉiutagaj interrilatoj inter infanoj kaj junuloj de la du seksoj estas sola kaj plenefika antaŭgardilo kontraŭ la morala malvirtiĝo en la kazern-internulejoj kaj monaĥinaj lernejoj. En tiuj ĉi institutoj, la tre naturaj kaj permeseblaj sentoj de amemo, de mildkoreco, de sindonemo, — sentoj, kiujn havas ĉiu infano – estas konstante subpremataj; kaj ĝuste pro tio ili ofte fariĝas supermezure intensaj, eĉ nenaturaj. El tio rezultas tiuj tro oftaj okazoj de psika senekvilibreco, kies sekvoj estas, kiel oni scias, treege gravaj. Statistikaj nombroj mankas; sed de edukistoj kaj psikologoj ni havas unuanimajn atestojn, por pruvi, ke ekzistas nur unu sola rimedo kontraŭ ĉi tiu stato de aferoj: korpa ekzercado en libera aero por fortigi la nervan sistemon, kaj liberaj ĉiutagaj rilatoj kun reprezentantoj de alia sekso.

Ĉu oni timas malbonuzadon? A-priorie, tiaj timoj estas, eble, ne tute senbazaj; sed la faktoj pruvas, ke ili estas vanaj. Nekalkulante la subjektojn herede malvirtemajn, — tiuj ĉi estas, naturnecese, maloftaj, – la aliaj estas elmetataj al malpli da danĝeroj sub la kunedukada reĝimo, ol sub la monaĥeja. Kontentigante la naturajn bezonojn de l' koro, oni ilin tute ne ekscitas, male, oni kvietigas. Se ili senĉese renaskiĝas, almenaŭ ili ne transpasas la limojn, kiujn jam kontraŭmetis al ili la naturo; sola ilia nekontentiĝo kreas kvazaŭ amasiĝon de kaŝita pasio nesatigita, kiu refrapas la nervan sistemon, disŝancelas ĝin iom post iom, kaj povas tiam, sed nur tiam, konduki al malbonuzado.

Nenio estas tiel purega, tiel respektoplena kiel eksentata altiriĝo al alia sekso. Anstataŭ brulstampi, kvazaŭ ili estus pekoj, la simpatiojn de l' maturiĝanta aĝo, donante al ili tiumaniere ian moralan valoron; anstataŭ ilin riproĉi kaj per tio devigi sin kaŝi, – agado kiu nur pliigas la malbonon, – kial ne lasi ilin ekflori sindetene kaj freŝe, kaj tiel al ili konsenti ilian grandan edukan valoron? Oni ne povas imagi al si pli potencan vigligilon de vivo altruisma, de bonkoreco, de nekaŝemeco, de sindonemo, de disvolviĝo de l' tuta naturo intelekta kaj morala. Ĉe junulo sana kaj spi-

rite ĝustproporciita, la naturaj sentoj nepre neebligas ĉian malrespekton; tiu ĉi neebligo, siaspece psikologia, estas pli efika kaj pli certa, ol ĉiu ajn obstaklo materia. Infano absolute sana, kiel korpe, tiel ankaŭ spirite, troviĝante en sanaj vivokondiĉoj, ne povas deflankiĝi de la vojo de l'honesteco kaj rektanimeco.

La rezultatoj konstante atingataj en kunedukadaj internulejoj kaj la spertoj tie faritaj pruvas, ke, por eviti frumaturan vekiĝon de l'sentoj, ne ekzistas pli nepresukcesa rimedo, ol jena: Jam de frua infaneco lasi knabojn kaj knabinojn pligrandiĝi kune, permesante al ili, per la negravaj sendaŭraj konkuradoj de l' ĉiutaga vivo, ekkoni iliajn respektivajn karakterojn, en tiu aĝo, en kiu dormetas ankoraŭ la pasioj, kaj en kiu la instinktoj ankoraŭ estas puregaj.

Krom siaj efikoj antaŭgardaj kaj negativaj, la kunedukado havas ankaŭ aliajn. Kiel en la edukado morala, tiel ankaŭ en la scienca instruado, ĝi povas naski interseksan konkuremon, kies sekvoj estas tute rimarkindaj. En la klasĉambro la memestimo estas mirinda instigilo al la laboro; kaj aparte interese estas konstati, kiel granda estas la timo pri riproĉoj, kiun havas unu sekso en ĉeesto de la alia. Ne sole la emo al konkurado, sed ankaŭ la deziro al reciproka helpado estas pli forta; kaj tio faras el la klaso anaron pli ageman kaj pli viglan.

Sed ankaŭ la malsameco inter la reagmaniero de la knaboj kaj tiu de la knabinoj donas al la instruado stampon pli specialan. La knabinoj estas ĝenerale pli respondpretaj, pli impreseblaj, sed pli senpripensaj. Ĉiufoje kiam la instruisto faras al la klaso demandon, la unuaj ili volas respondi; sed tial, ke ili ne pripensis la plenan signifon de l'demando, ilia respondo estas ofte aŭ nesufiĉa aŭ tute erara. La knaboj, kontraŭe, reagadas pli malrapide, sed donadas respondojn pli zorge pripensitajn, pli sencoriĉajn, pli kompletajn. Kaj kio rezultas? Por ne resti malantaŭe, la knaboj, ankoraŭ penante paroli singarde, donas al sia pensado pli da intenseco kaj pli da rapideco al siaj respondoj. La knabinoj, siaflanke, hontantaj pro tio, ke iliaj senpripensaj aŭ nekompletaj respondoj estas korektitaj de knaboj, ekpripensas pli bone kaj ordigas siajn ideojn kun pli da logiko kaj decideco. Kvankam nek la spirito asimilema de la elemento virina nek la spirito pliĝustedire konstruema de la vira elemento esence modifiĝas, — tio estas ennaskitaj tendencoj, kiujn nenio iam ŝanĝos, — ĉiu sekso alprenas iom post iom la ecojn de la alia kaj disvolviĝas en direkto al aparta harmonio, kiu ne povas ne esti por ĝi utila.

Ankoraŭ pli grandaj estas la efikoj de l'kunedukado sur la karaktero. Valoras la penon noti ĉi tie la regulan psikan procedon

de la du seksoj, kiam ili sin trovas en reciproka apudestado. Ĝis la ekviriĝa aĝo la geknabetoj sin intertoleradas sufiĉe bone; negravaj antogonismoj, rapidaj reamikiĝoj, akordiĝoj, pri gustoj, laboroj, ludoj — jen tio, al kio limiĝas iliaj interrilatoj.

Ĉirkaŭ la aĝo de dek du aŭ dek kvar jaroj, tre ofte okazas ĉe la knaboj subita ŝanĝo, kiu daŭras kelkfoje ĝis la aĝo de dek ses jaroj proksimume: tiam montriĝas ĉe ili, rilate al la malforta sekso, spirito de konkuremo, de malestimo, de moka kritikado. Oni tion rimarkas precipe ĉe knaboj edukitaj en familio aŭ malproksime de virina influo. Kolerigadas ilin pli ol iam la sentemeco de la knabinoj, ilia koketeco, ilia babilado kaj tiuj mankoj, kiuj al la knabinoj mem tro ofte ŝajnas negravaj — mankoj de sincereco kaj de kuraĝo morala. En kunedukadaj institutoj tiu krizo tute natura reduktiĝas al sensignifa afero: la morala teniĝo de la lernejo, la tie reganta spirito de bonvoleco kaj servemo, kaŭzas ke la knaboj malplej ofte esprimas siajn kritikojn kaj montras malpli multe sian antipation. Cetere, la krizo estas normala: ĝi estas kvazaŭ ekfloro de tiu sento de fizika supereco kaj potenco kreema, kiun havas ĉiu junulo.

Tamen tiu spiritinklino estas pasema. Post kelka tempo, kiam la supereco de la junulo trovis laŭmeritan rekonon kaj malimplikiĝis de ĉia konkurado, lia memestimo disvolviĝas en spiriton de protekto kaj sindono. Tiuj virinaj ecoj, kiujn li ne posedas, ekŝajnas al li amindaj kaj valoregaj ĉe la knabino; kaj nun li jam ne revenas al ŝi kiel kamarado, nek kiel kontraŭulo pli-malpli malsekreta, sed, pli ĝuste, kiel amiko nekaŝema kaj sincera, kiu bone komprenas, ke amika kunlaborado povas alporti al ambaŭ plej gravajn utilojn.

Ŝajnas, ke la knabineto, pligrandiĝante, ne trairas krizon similan. Jam en plej frua aĝo montriĝas en ŝi la ecoj de l' virino. Kvankam bedaŭrante la maldelikataĵojn de l' knaboj, iliajn kriojn, perfortaĵojn, malkonvenajn parolojn, ŝi toleras ilin, ŝi paciencas, esperas; ŝi pripensas, ke ilia karaktero estas io, kion oni nepre devas akcepti tian, kia ĝi estas, ĉar ĝi sendube pliboniĝos. Estas jam iu trajto patrina en ŝia maniero pardoni tiujn ekscesetojn de la naskiĝanta vireco. Ju pli aĝa ŝi fariĝas, des malpli ŝi sentas da antipatio por la troflameco de l' viro; eble ŝi neklare pripensas, ke tiu forto, kiun ŝi samtempe admiras kaj mallaŭdas, servos al ŝi en posta tempo kiel protekto kaj rifuĝejo; kaj se ŝi iufoje riproĉas, ŝi per tio nur celas malhelpi al malbonuzado kaj elmontri tiun influeman kaj edukeman instinkton, kiun donis al ŝi, jam en frua infaneco, ŝia estonta rolo de patrino.

Kiam la junulo pli aŭ malpli frue revenas al ŝi, ŝi havas la senton, ofte pravan, ke li ion ŝuldas al la influo, kiun ŝi antaŭe havis sur li; kaj tiun influon ŝi daŭrigos dum la tempo de l' amikeco, same kiel ŝi jam faris dum la tempo de l' konkurado. Kaj vere ŝi ne eraras. Eĉ ne konsciinte pri tio, la junulo evoluciis en apudestado de l' knabinoj tute alie, ol kiel li tion farus malproksime de ili.

(Daŭrigo venos.)

El franca lingvo tradukis

Prof. *J. W. Eggleton* (Haŭbinda, Germanujo).

## Principoj de edukado de l' volo.

De *Stanislav Tomič*, Hartberg (Stirio-Aŭstrio).

La plej grava flanko de l' edukado estas la edukado de l' volo, ĉar de ĝi dependas la karaktero de homo. Bedaŭrinde sur tiun ĉi flankon de edukado oni plej malmulte direktas sian atenton, kaj plej ofte la volo disvolviĝas, ne sub racie elektitaj influoj, sed sub hazarda kombino de mediaj kondiĉoj.

Por sukcese konduki la edukadon de l' volo estas necese, ke la edukanto havu klaran ideon pri la volo kaj pri la influoj, kiuj direktas ĝin al bono aŭ malbono, al firmeco aŭ ŝancelemo. La ideo pri volo estas ĉe la plejmulto tre malpreciza, kiel klare montras la tiel ofte aŭdata frazo: vi povas se nur vi volas; aŭ, havu fortan volon kaj ĉio sukcesos. Tiuj ĉi konsiloj estas samvaloraj kun la jena: vi ja povas pagi, havu nur monon.

Por persono kun firma volo tiaj konsiloj estas superfluaj, kaj por ŝancelemulo ili estas senefikaj. Sensenca estas admono. havu fortan volon; la sole racia estus montro de rimedoj por akiri ĝin, por disvolvigi ĝin en si.

La ideo pri volo, kiel ĉiuj homaj ideoj, estas simbolo reprezentanta en pensado aron da fenomenoj. Kiel al ideo „arbo" korespondas nenia objekto ekster ni, sed ĝi nur reprezentas aron da perceptaroj kaŭzitaj de certaj vegetaĵaj fenomenoj; tiel al ideo „volo" korespondas ne ia individueca esto, sed grupo da subjektivaj fenomenoj. Por klare kompreni la ideon pri volo, ni devas priobservi tiajn fenomenojn en konkreta okazo, t. e. analizi decidojn:

Decido estas kelkfoje senpera objektiviĝo de deziro, sed pli ofte ĝi estas rezultanto de multaj pli malpli intense kontraŭagantaj impulsoj.

Kiam mi estas malsata kaj troviĝas en propra hejmo, la deziro manĝi povas senpere objektiviĝi, ĉar nenia ideo kontraŭstaras ĝin, sed se mi troviĝas en fremda hejmo, mia deziro manĝi

povas esti same intensa, kiel en la antaŭa okazo, tamen ĝi ne povas senpere objektiviĝi: ĝin kontraŭstaras ĝeno postuli manĝaĵojn de fremdulo.

Tio ĉi estas plej simpla ekzemplo; en multaj okazoj la ideoj kaj emocioj, el kiuj la decido estas rezultonta, estas multe pli multnombraj kaj malsimplaj. Spite tiu malsimpleco ni trovas unu komunan leĝon por la decidoj, nome: la decido dependas ekskluzive de emocioj; perceptaroj nevekantaj emociojn estas senpotencaj.

La emocioj estante la solaj kaŭzoj de niaj decidoj devas esti antaŭ ĉio pristudataj; tamen la limoj de tiu ĉi artikolo ne permesas elĉerpigan analizon de emocioj, kaj mi nur citos la rezultatojn, al kiuj tiu analizo kondukas. La emocioj estas la sentoj de harmonio aŭ disharmonio inter deziro kaj ebleco. La deziro estas la emo disvolviĝi, emo komuna al ĉiu estaĵo, sekve ankaŭ al ĉiu korpa ĉelo kaj ĉiu ideo en spirito. Kutimo, inklino, gusto, instinkto ktp. estas diversaj esprimoj por la sama fundamenta esteco de deziro estas do tute kompreneble, ke la intenseco de l'emocio dependas de la forto akirita per la antaŭa disvolviĝo de l' elemento subjekta naskanta ĝin. Tial la instinktoj, estante forte enradikigitaj per la jarmila antaŭa evolucio de organismoj, estas multe pli potencaj ol la inklinoj disvolvitaj per edukado.

Nenia korpa aŭ spirita elemento povas disvolviĝi sen objektiviĝado t. e. sen agado; tamen la eksteraj kondiĉoj ofte malhelpas, eĉ malebligas la objektiviĝon de deziro. Harmonion inter deziro kaj ebleco ni nomas ĝuo, disharmonion inter ili doloro. La esteco de ĉio vivanta estas eviti dolorojn kaj penadi al ĝuoj.

La spertoj montras tamen al ni, ke ĉiama ĝuado estas neebla; ke ofte por akiri daŭran, altan ĝuon ni devas oferi multajn aliajn malpli valorajn, eĉ volonte akcepti dolorojn. La sumon de tiuj ĉi spertoj ni nomas prudento kaj la kapablon pli malpli malproksime antaŭvidi okazonton — saĝo.

Ĉiu percepto vekas en ni emocion aŭ antaŭsenton de emocio, kiu igas nin reagi t. e. penadi eviti aŭ akiri ĝian influon. La perceptoj, estante nur konsciataj ŝanĝoj en la funkciada aktiveco de nia nervaro, ne estas io identa nek simila al eksteraj agantoj kaŭzintaj ilin, do ili havus nenian valoron, se ili ne estus asociitaj en la memoro kun emocioj. La perceptaroj estas do antaŭsignoj, kiuj montras al ni, kian emocion ni devas atendi de iu ŝanĝo en ĉirkaŭanta nin mondo de fenomenoj. Tiel intime asociitaj perceptaroj kaj emocioj kunfandiĝas en la memoro en la ideojn, kiuj regas ĉiujn agojn de la homo.

En la memoro la ideo fariĝas parto de nia subjekto, kaj ĝia disvolviĝo fariĝas fonto de novaj emocioj, ĉar ne nur ĉiu korpa organo emas disvolviĝi, sed ankaŭ ĉiu ideo penadas akiri potencon super la aliaj. Ĉar du ideoj povas esti kontraŭdirantaj aŭ ne, la kombiniĝo de ideoj naskas senton de harmonio aŭ disharmonio, t. e. ĝuon aŭ doloron.

Ĉiu antaŭvido estas ideo, kaj ĉiu decido estas rezultanto de momentaj deziroj kaj antaŭvido pri rezultatoj de ago, sekve ĉiu prudenta decido dependas de la klareco kaj potenco de ideoj. La eksteraj kondiĉoj de la vivo senĉese ŝanĝiĝas, do ankaŭ la influo de l' medio ne reprezentas unu direktan regulanton de agado. Ni do devas serĉi en la subjektiva stato de homo apogon por konstanteco, kaj tian apogon liveras nur la superrego de unu ideo super ĉiuj aliaj. Efektive, kio estas forta volo? Ĝi estas subjugo de ĉiuj deziroj kaj impulsoj sub unu nura kondukanta ideo, la ideo cela. Neebla estas firmeco, kie mankas celo. Ekzemple, Napoleonon regadis dumvive la ideo pri povo, senlima potenco. Se tiu ĉi ideo cela ne estus estinta pli forta ol la sumo de ĉiuj aliaj subjektivaj impulsoj, li neniam estus alveninta al sia grandega, kvankam nelongedaŭra, sukceso. En la mondo de ideoj regas la sama leĝo, kiel en la fizikaj organaroj. Se unu organo estas pli ofte uzata ol la aliaj, ĝi hipertrofiiĝas kaj fine fariĝas karakteriza parto de l' organismo. Same se unu ideo estas ĉiam flegata kaj tre ofte revokata en la konscion, ĝi plifortiĝas per la kosto de aliaj, kaj fine impresas sian stampon al tuta spirita vivo, al karaktero de l' subjekto. Estas do klare, ke la decidoj de tiu subjekto dependos ĉiam ĉefe de la ideo reganta, kaj tion ni nomas konstanteco. Se male ĉiuj ideoj en la subjekto estas samgrade disvolvitaj, la spirita energio estas dispecigita, kaj ĉiu decido estas regata de multaj same fortaj impulsoj; kompreneble, en tiu okazo la kondiĉoj favorantaj hodiaŭ tiun, morgaŭ la malan ideon. Tiun dependecon de eksteraj cirkonstancoj ni nomas ŝancelemo Multaj fortoj ankaŭ perdiĝas pro fantaziemo, t. e. por kombiniĝoj de ideoj laŭ deziroj, sen intenco nek ebleco objektivigi ilin. Per multa ekzerco la fantaziulo elvekas emociojn, kiuj normale estas sekvo de dezira objektiviĝo, kaj ĉar por fantaziaj kreitaĵoj malebleco ne ekzistas, ili reprezentas gravan danĝeron por la spirito: ili detruas la kontraŭstaremon de subjekto al realaj malhelpoj. Sur ĉio dirita fondiĝas jenaj principoj por la edukado de l' volo:

1. Konformigi ĉiam ĉiujn pensojn kaj agojn al difinita, ebla kaj alta celo.

2. Per senĉesa serioza okupado de spirito, eviti longedaŭran staton de spirita malstreĉeco, dum kiu ordinare disvolviĝas, pro manko de kontraŭstaro, malutilaj emoj.

3. Hardigi senĉese spiriton kaj korpon, por sukcese kontraŭstari eksterajn influojn.

4. Per serena analizado de propraj ideoj, malebligi la enradikiĝon de fantaziemo.

## La gepatroj kaj la edukado de la japana infanaro en la familio.

Estas peninde konatiĝi pri la maniero, je kiu en Japanujo, kie la popolo sin distingas per karakterizaj opinioj, la unuaj vivjaroj estas pasataj sub la gardado de la gepatroj. La Grafo Vay de Vayja en Luskod pri tio komunikas[1] i. a. la jenon.

Ofte oni nomas Japanujon la paradizo de la infanoj, la lando, kie infano neniam ploras. Volonte mi konsentas la unuan aserton, sed la dua tre certe estas elparolita de iu, kiu ne konas la malgrandajn Japanetojn.

Estas sufiĉe loĝi nur mallongan tempon en japana vilaĝo aŭ pli bone en japana familio, por konvinkiĝi pri la kontraŭo. Por diri la veron, nenie en la tuta mondo la infanoj havas pli bonajn voĉilojn kaj nenie ili pli bone scias uzi ilin. Pro la plej eta bagatelo, pro nenio, la larmoj fluas. La diferenco inter Japanujo kaj aliaj landoj estas, ke ĉi tie je la unua signo de infana ĉagreno, patro, patrino, geavoj, fratoj kaj fratinoj, la tuta familio, entenata la servistaron, rapidegas al la infano por kiel eble plej baldaŭ ĝin trankviligi.

Observante ĉiujn epokojn de la nacia edukado oni vidas, ke tiu eksterordinara amemo por la unua juneco, estas pli interesa ol oni komence opinius. Ĉu ne estas la unuaj rememoroj tiuj, kiuj postlasas la plej grandan impreson en nia animo? Kaj ĉu ne estas la plej konstantaj imagoj, kiujn oni havigis al ni en nia juneco? Ĉu oni ankaŭ ne akiris la alkliniĝon de la infano per boneco kaj amo? Kaj tamen la japanaj gepatroj bonege obeigas sin. „Tom Sawyer" tie estas neekzistebla estaĵo, ĉar la transdono de infano al la sorto, kiel en Eŭropo, estas ne konate. La granda profito, kiu estas ĝuata de la japana infano, estas posedi ludejon, aŭ pli bone dirite, estas, havi la povon aliformigi la tutan domon en ĝi. El tiu vidpunkto, tiuj infanoj estas tre privilegiitaj; ĉar granda lumigata kaj aeruma ĉambro, en kiu la familio ĉiutage restadas, estas bonega ludejo, kaj ĉiam la gepatroj estas inklinaj por ludi kun ili. Multfoje oni trafas la tutan japanon familion, gemaljunulojn kaj gejunulojn, rulantajn trans la plankmatojn kaj

[1] Revue des deux mondes, 1908.

okupantajn sin kun ia ajn infana ludo. Ĉu oni ne rakontas la saman pri Henriko IV, unu el la plej grandaj princoj, kiujn konis lia patrujo? Ĉu oni ne rakontas, ke unu tagon la hispana delegito lin surprizis, dum li ludis „ĉevaleton“ kun lia fileto, kaj ke la reĝo simple diris al li: „Ekscelenco, vi ja ankaŭ havas infanojn!“ kaj daŭrigis la ludon?

En Japanujo ĉiu patro farus la samon; nur li kaŝas kutime sian amecon kaj malseverecon antaŭ la mondo. La plimulto de la japanaj infanoj vivas en atmosfero de amo, kies ameca aromo restas ĝis la maljuneco.

Ĉe la malriĉuloj same kiel ĉe la riĉuloj, la infanetoj estas ĉirkaŭataj de zorgoj kaj pruvoj de amo. Ilia sinteniĝo, ilia eksteraĵo estas la fiereco de la familio. Japanino sin tute dediĉas al siaj infanoj, ilin banante, zorgante, ke iliaj haroj estu tondataj kaj ke ili estu vestataj en multkoloraj vestoj. Ĉiu patrino eĉ en la plej altaj klasoj de la socio, mem mamnutras sian infanon, kion ŝi daŭrigas dum tri, kvar aŭ kvin jaroj.

Fremduloj, kiuj unuafoje vojaĝas en Japanujo estas mirigitaj, kiam infanoj, jam marŝantaj kaj parolantaj, subite haltas antaŭ la patrino kaj postulas mamnutron, kiu tuj estas donata. Ofte mi informis pri la kaŭzoj de tiu patrina dediĉo. Oni respondis al mi, ke ĝi estas nur kutimo, aŭ ke la patrino ne povis toleri, ke ŝia infano ploru. Sed ŝajnas al mi, ke pli akceptebla kaŭzo klarigas ĉi tiun gravan dediĉon: estas la avido enĉizi en la infanan koron agrablan rememoron pri la juneco kaj enigi en la infanojn sentojn de dankeco. Dum la juĝado de la japanaj situacioj oni neniam devas forgesi, kia grava parto en la edukado de la infanoj estas la familia vivo; ĝi fundamentas sur la infana respekto. Pruvon pri tio oni povas vidi en la dediĉo kaj amo, kiun havas la plej proksimaj kaj la plej malproksimaj parencoj por grizharuloj, malriĉuloj, malfortuloj kaj orfoj. Kiam oni tion konsideras, la intersindoneco, kiu dum jarcentoj ekzistas inter gepatroj kaj infanoj, estas pli facile komprenebla, kaj tio ĉi helpos al ni senkulpigi malgrandajn pekojn, kiujn ni trovas strangaj en Japanujo.

Kvankam ili tre dorlotas iliajn infanojn per tre granda indulgemo, la gepatroj scias obeigi kaj respektigi sin. Kio koncernas la sinteniĝon, la ceremoniojn, la interparoladojn, ili estas ĉiam tre agrablaj. La japanan ĝentilecon, la plej eminentan el la mondo, oni ĝenerale elkonas tiel. En Japanujo en ĉiuj klasoj de la societo, senescepte, la lingvaĵo ĉiam estas ĉarma, eĉ en la plej intimaj interparoladoj. En ĉiu tiu rondo la infanoj vivas kaj senkonscie, senartifike ili akceptas la samajn formojn kaj uzojn.

Ilia plej granda ambicio estas fariĝi kiel la gepatroj. El ĉio ŝajnas, ke la proverbo laŭvere diras, nome, ke ekzemploj allogas.

La ĝentilaj kutimoj de la japanaj infanoj ofte estas rigarditaj de fremduloj kaj klasigitaj de verkistoj, sed pri la vivo plendediĉa de la gepatroj oni neniam sufiĉe atentigis.

Senĉese ili senplende sin detenas de multaj aferoj, por fari la restadon en la gepatra domo kiel eble plej agrabla.

Por veki en la infano la plej intimajn sentojn, ili ĉirkaŭas ĝin kun amo kaj donas al ĝi okazon, esprimi ĝian infanan sindonecon, kiu estas la fundamento ne nur de amo kaj dediĉo kontraŭ la gepatroj, sed ankaŭ de obeemo al la aŭtoritato kaj fideleco al la imperiestro.

Infanoj edukitaj jenmaniere estas bonegaj lernantoj de la popollernejo. La instruisto facile konservas la ordon, kaj la infanoj rapide progresas, ĉar ĉiuj insiste laboras, se ne el pura amo al la studo, tiam almenaŭ el respekto por si mem kaj por ne malhonorigi la gepatrojn.

Tradukis *M. J. Wessel* (Rotterdam, Nederlando)

## La nordiaj instruistkongresoj.[1]

De *N. Moesgaard*, instruisto en Kjoege (Danujo).

Eble kelkaj legantoj de I. P. R. konas la vorton „skandinavismo". Skandinavismo estas nomo por tiu sento, ke la tri skandinavaj aŭ nordiaj popoloj: danoj, norvegoj kaj svedoj faras etnografian unuon laŭ komuna deveno kaj antaŭe komuna lingvo. Per la vorto „skandinavismo" oni ankaŭ nomas la penadojn por alproksimigi kaj kunligi la skandinavojn en rilatoj spiritaj kiel ankaŭ materiaj kaj politikaj. Precipe en la mezo de la XIX. jarcento la entuziasmo por tiu ĉi afero estis granda inter la skandinavaj studantoj universitataj.

Ili kunvenis grandanombre, festis, paroladis, kantadis kaj — drinkis por la granda celo, la skandinava unueco. Sed la utilo de tiuj studantaj kunvenoj ne iĝis tiel grava kaj signifa kiel la partoprenantoj revis. Tamen oni ne povas diri, ke la kunvenoj estis senfruktaj, tute ne; ili interalie multe influis la instruistaron en Nordio, kaj unu el la fruktoj certe estas la nunaj nordiaj instruistaj kongresoj (dane „De nordiske Skolemöder" = la nordiaj lernejkunvenoj), kiuj jam longe estis la plej grandaj kaj plej signifaj kunvenoj inter skandinavoj.

[1] En tiu ĉi artikoleto mi uzis la vortojn Nordio kaj nordia en la senco Skandinavujo kaj skandinava, ĉar mi opinias, ke la vortoj »Nordo« kaj »norda« ne estus tute konvenaj por tiu ĉi uzo. Cetere la vorto »Nordio« prave ne nur rilatas al Danujo, Norvegujo kaj Svedujo, sed ankaŭ al Finnlando.

La iniciativo por alvoki al komunaj nordiaj instruistkunvenoj eliris el Danujo, kaj unu el la plej fervoraj parolantoj por tiu afero estis la konata dana pacifisto Fr. Bajer, sed la definitivan decidon por efektivigi la ideon oni faris dum la sesa sveda lernejkunveno en Örebro en la j. 1868, en kiu ankaŭ partoprenis kelkaj danoj, norvegoj kaj finnoj.

Elektinte estraron por ĉiu lando, oni elsendis alvokon al la instruistaro kaj al amikoj de instruado por kunvenigi ilin al la unua nordia instruistkongreso, kiu estis malfermita en la sveda urbo Göteborg la unuan de aŭgusto 1870 kaj daŭris tri tagojn. Oni ankaŭ esprimis la deziron, ke lernej-amikoj de Finnlando volu partopreni en la kongreso.

En la alvoko oni diris interalie: „La nordiaj popoloj jam longatempe havis estimindan pozicion inter la Eŭropaj nacioj koncerne la popolan klerecon. Tial la popola instruado nun estas por ili unu el la plej gravaj sociaj demandoj, kaj ĉe ili ĉiuj oni faras gravan kaj fortan laboradon pedagogian.

Sed tamen la organizo de popollernejoj en Skandinavujo montras ne sensignifajn diversecojn, kaj certe ankaŭ la instruado estas gvidata laŭ sufiĉe diversaj metodoj. Interŝanĝo de spertoj kaj opinioj tial devas esti utila kaj konduki al profitiga kunago por la komuna granda celo. La aparta civilizacia laboro, farita de ĉiu el la tri popoloj, fariĝos per komparo de la rezultatoj ankoraŭ pli fruktoporta.

La plej grava signifo de kunvenoj inter amikoj de bonafero tamen certe konsistas el tio, ke ili kreu novan vekiĝon kaj pli vivantan fervoron por la progreso de la afero. Oni farus konatiĝojn personajn, kaj la komuna kulturlaboro fariĝos ligilo inter la unuoj; plie, ĝi servos por kunligi pli kaj pli intime la popolojn. En tio oni ankaŭ trovas la kaŭzon por kunvenoj inter diversaj scienculoj, artistoj, metiistoj k. c. ĉiulandaj. Kaj certe instruistoj kiel entute amikoj de la lernejoj kaj instruado bezonas ne pli malmulte similajn kunvenojn."

Ĉi tiuj vortoj certe estas pravaj eĉ hodiaŭ; efektive la nordiaj instruistkongresoj havis kaj havas grandan signifon por la instruistaro en la nordiaj landoj, kaj la tieaj geinstruistoj partoprenas en pli kaj pli grandanombro en la kunvenoj, kiuj nun okazas ĉiukvinjare alterne en Kopenhagen, Kristiania kaj Stockholm. Multaj temoj koncerne la lernejon, geinstruistaron kaj edukadon estas pritraktitaj dum la kongresoj, en la animojn estis dismetitaj multaj semoj, kiuj poste ĝermis al prospero por ĉiutaga laboro, multaj amikecoj estis ligitaj dank' al la amuzigaj kunvenoj kaj la bone

arangîtaj ekskursoj en la koncerna kongreslando. Kaj ne malpli grava estis la plenaj ekspozicioj de materialoj kaj iloj plej novaj koncerne al lernejo kaj instruado, kiujn oni ĉiam arangîs kune kun la kongreso.

Post ĉiu kongreso oni eldonis libron sufiĉe grandan, enhavantan detalan raporton pri la kongreso, precipe pri la diversaj paroladoj kaj diskutadoj.

La lasta kongreso, la naŭa, okazis en Kopenhagen, kaj en la venonta somero, en la tagoj 9—12. aŭgusto 1910, okazos la deka nordia instruistkongreso en Stockholm. Ankaŭ dum tiu ĉi kongreso oni arangôs ekspozicion de helpa materialo por la instruado.

Mi rekomendas al gekolegoj esperantistoj partopreni en tiu ĉi kongreso. Stockholm estas belega urbo, kaj ili tie trovos multe da vidindaĵoj kaj certe ankaŭ sufiĉe multe da samideanoj. Sendube la venonta Stockholma kongreso estos la ĝis nun plej granda.

La ĉi suba tabelo montras la* nombron de partoprenintoj en la nordiaj instruistkongresoj.

| Kongresoj laŭ vico | Kongresurbo | Kongres-jaro | Partoprenintoj entute | El Danujo | El Norvegujo | El Svedujo | El Finnlando | El aliaj landoj |
|---|---|---|---|---|---|---|---|---|
| 1 | Göteborg . . . | 1870 | 840 | 71 | 190 | 575 | 6 | — |
| 2 | Kristiania . . . | 1874 | 1164 | 78 | 923 | 155 | 8 | — |
| 3 | Kopenhagen . . | 1877 | 1910 | 1106 | 325 | 452 | 23 | 4 |
| 4 | Stockholm . . | 1880 | 5227 | 1273 | 670 | 3080 | 204 | – |
| 5 | Kristiania . . . | 1885 | 3470 | 1150 | 1600 | 600 | 120 | – |
| 6 | Kopenhagen . . | 1890 | 5300 | 3000 | 1100 | 1000 | 160 | – |
| 7 | Stockholm . . | 1895 | 6554 | 1500 | 1057 | 3666 | 322 | 9 |
| 8 | Kristiania . . . | 1900 | 5563 | 1254 | 2343 | 1766 | 197 | 3 |
| 9 | Kopenhagen . . | 1905 | 6975 | 3772* | 922 | 1952 | 317 | 12 |
| 10 | Stockholm . . | 1910 | – | – | — | – | – | – |

# Lernejo kaj instruisto en Japanujo.

De prof. *Kiuichi Nohara* el Chofu (Japanujo).

La kurso de l'elementara lernejo estas dividita je du gradoj: ordinara kaj alta. Laŭ la imperia edikto pri elementara lernejo, publikigita en la j. 1907 la lernodaŭro ĉe la „Ordinara Elementara Lernejo“ (O. E. L.) estas 6 jaroj, kaj ĉe la „Alta Elementara Lernejo“ (A. E. L.) estas 2 aŭ 3 jaroj. La instruobjektoj estas: moralo, gepatra lingvo, aritmetiko, gimnastiko, nacia historio, geografio, natura historio, desegnado, kantado, kudrado (por knabinoj); oni ankaŭ povas (estas permesata) instrui la manlaboradon. Dum la unuaj 4 jaroj en la O. E. L., oni instruas nur la unuajn 4 lern-

* Enkalkulitaj 11 personoj el Islando.

objektojn (moralo, gepatra lingvo, aritmetiko kaj gimnastiko). Nuntempe ni havas 24.125 elementarajn lernejojn, en kiuj laboradas 122.038 geinstruistoj kaj ĉeestas 5,713.698 infanoj.

La infanoj 6—14 jaraj estas nomataj „lernaĝaj infanoj". Ni devas ĉeestigi niajn infanojn en la lernejo, kiam ili havas lernaĝon. Tiu devo komencas je la komenco de l' unua lernejojaro post ke la infanoj ekatingis la lernaĝon kaj daŭras ĝis tiam, kiam ili finas la kurson de O. E. K. En la j. 1907 estis 7,024.930 lernaĝaj infanoj, el kiuj 97·88% estis ĉeestantaj la lernejon aŭ finintaj la kurson de O. E. L.

El la supredíritaj 27.725 lernejoj, 3 estas ŝtataj lernejoj (t. e. subtenataj de l' ŝtata elspezo), 65 estas subtenataj de l' provincaj registaroj, 225 estas privataj kaj ĉiuj aliaj estas subtenataj de komunumoj. Ĉiu komunumo ja devas fondi kaj subtenadi almenaŭ unu O. E. L. La 26.832 komunumaj lernejoj enhavas 112.079 klasojn. La nombro de infanoj en unu klaso ne devas superi 70 ĉe l' O. E. L., aŭ 60 ĉe l' A. E. L.

Por instrui la kandidatojn de instruistoj, ĉiu provinco devas fondi kaj subtenadi, per sia elspezo, almenaŭ unu „Normalan Lernejon" (Instruista Seminario). En la j. 1907 ni havis 69 da normalaj lernejoj. El ili, iuj estas por virinoj, aliaj estas por geviroj, sed plejmulto estas por viroj. La nombro de gelernantoj en tiuj ĉi lernejoj estis 19.568.

En la viraj N. L. estas tri fakoj: la I. propra fako, la II. propra fako kaj la malaltgrada fako. La lernantoj, kiuj eniras en la I-an propran fakon, devas esti jam finintaj la kurson de l' A. E. L. aŭ instruitaj je la simila grado; la studado daŭras dum 4 jaroj. La II-a propra fako akceptas tiujn lernantojn, kiuj jam finis la kurson de l' mezolernejo[1], kaj la studado daŭras unu jaron. Fininte la studadon en la N. L., oni ricevas la diplomon, kiu certigas oficiale lian taŭgecon je la elementara instruisto. En la malaltgrada fako oni instruas la kandidatojn de l' helpantaj instruistoj, aŭ la instruistojn, kiuj povas labori nur en la O. E. L. kaj ne en la A. E. L. La daŭro de studado estas dependanta.

La virina N. L. akceptas la lernantinojn, kiuj jam finis la kurson de l' A. E. L. aŭ tiujn, kiuj estas instruitaj je l' simila grado. Studado daŭras dum 3 jaroj, kaj la gradigintinoj ricevas la similajn diplomojn kiel la supredíritaj.

La gelernantoj de N. L. estas instruataj kaj eĉ nutrataj senpage, pro kio ili estas divigataj nepre servadi kiel geinstruistoj dum

---

[1] La duagrada lernejo, kien eniras la knaboj, kiuj jam finis la kurson de l' O. E. L., kaj lernadas dum 3 jaroj.

7 jaroj (ĉe viroj), aŭ 5 jaroj (ĉe virinoj) en tiu provinco, al kiu la N. L. apartenas.

Oni povas ankaŭ fariĝi instruisto, trapasinte la ekzamenon, kiu okazas ĉiujare en ĉiu provinca registarejo.

La sumo de salajro por la gradigintoj de N. L. estas ĝenerale 192–216 Yen (Yen = 1·023 Sm.) ĉe la komenco kaj por la gradigintinoj 168 Yen. Tiu sumo plimultiĝas iom post iom (sed ne regule) ĝis tiam, kiam ĝi atingas 1200 Yen; spite tio, tamen neniu ĝis nun ricevis tiun maksimuman sumon. Jen estas kelkaj statistikaj ciferoj (1907):

| Sumo de salajro | Nombro de geinstruistoj de O. E. L. [2] | Nombro de geinstruistoj de A. E. L. [2] |
|---|---|---|
| Yen 168 kaj malpli | 24.155 | 2.978 |
| „ 180 – 228 | 16.858 | 8.655 |
| „ 240 – 288 | 7.519 | 8.621 |
| „ 300 – 348 | 695 | 1.895 |
| „ 360 – 408 | 439 | 1.245 |
| „ 420 – 468 | 257 | 767 |
| „ 480 | 106 | 244 |
| „ 540 | 56 | 146 |
| „ 600 | 24 | 68 |
| „ 660 | 7 | 37 |
| „ 720 | 1 | 18 |
| „ 780 | 2 | 8 |
| „ 900 | 0 | 1 |
| Mezokvanto | Yen 190 6 | Yen 249 |

La ĉi supraj ciferoj montras la sumojn de la „propra salajro“ t. e. la sumojn elpagatajn el la komunumaj kasoj; krom tio la instruistoj ankaŭ ricevas la „aldonaĵon por la longatempa meritanta servado“ de l' ŝtata kaso, laŭ jenaj reguloj: Tiu, kiu ade laboris dum pli ol 5 jaroj en unu sama provinco, ricevas jare Yen 27, kaj tiu, kiu laboradis dum pli ol 10 jaroj, ricevas Yen 48. Oni ricevas ankaŭ specialan aldonaĵon Yen 18 aŭ plimulte, se oni laboras en la malproksimega regiono.

## La popolaj lernejoj en Rumanujo.

De *M. Timuš*, instruisto en Roŝiorj-Ilfov (Rumanujo).

Laŭ nuna leĝo de l'unuagrada instruado, tuta geknabinaro de 7–14 jaraĝo estas devigata ĉeesti lernejon aŭ ekpruvi al ĝi similan instruadon, se ili estas rumanoj.

La instruado por la rumanoj estas senpaga; la fremduloj devas pagi takson.

[2] Tie ĉi la helpantaj instruistoj kaj sendiplomuloj estas esceptitaj.

Kiam la gelernantoj forestas de lernejo, oni monpunas iliajn zorgantojn.

La fakoj de l' unuagrada instruado estas: religio, civila rajto, legado, skribado, rumana lingvo, aritmetiko, geometrio, historio, geografio, naturaj kaj fizikaj sciencoj, higieno, desegnado, muziko, ludadoj gimnastikaj, militaj ekzercoj, manlaborado kaj praktika terkulturado.

Tiuj materioj estas dividitaj en la urboj en kvar klasojn; en la vilaĝoj laŭ la nombro de l' instruistoj, nome: se la lernejo havas unu instruiston, li instruas tutan lernantaron dividitan en kvin klasojn; se estas du, unu instruas la unuan klason, la dua aliajn kvar klasojn. Se estas tri instruistoj, tiam unu instruas unuan klason. la dua duan kaj trian klason kaj la tria kvaran kaj kvinan klason. En tiu okazo la dua kaj tria klaso formas la duan divizion, kiu lernas la materio al ĝi difinita, en la daŭro de du lernjaroj; ankaŭ la kvara kaj kvina klaso formas la trian divizion por la aliaj du jaroj. Se la lernejo havas kvar instruistojn, ili instruas kiel en urbo ĉiu instruisto apartan klason po unu jaro.

*La vilaĝaj lernejoj.* Kie ajn troviĝas 40 lernejaĝaj infanoj oni starigas lernejon, kondukitan de helpinstruisto, posedanto de l' instruado de gimnazio aŭ similaj lernejoj; kiam estas 80 geknaboj, la lernejo estas kondukita de instruisto (diplomita de la normala lernejo); ĝis 140 gelernantoj oni starigas du instruistojn; ĝis 200—tri; por plimultaj – kvar instruistojn. En la knabinaj lernejoj funkcias nur instruistinoj; en la geknabaj lernejoj funkcias geinstruistoj, tamen la lernejestro devas esti viro. La lernado komencas la 14. de septembro kaj finiĝas la 13. de junio.

*La urbaj lernejoj.* En urboj la lernado komencas je la 8. septembro kaj finiĝas je la 8. julio. En la knabinaj lernejoj devas esti nur instruistinoj; en knabaj kaj geknabaj lernejoj povas esti ankaŭ instruistinoj, sed la lernejestro estas viro, kiel ankaŭ la instruisto de tria klaso de knaboj.

*Pri instruistoj.* La posedanto de l' atesto de la lernejo de unua grado post medika, muzika kaj scienca konkurso (ekzameno) povas eniri en la normalan lernejon, kie devas lerni ses jarojn, kaj fari maturan ekzamenon por ricevi la titolon de vilaĝ-instruisto provizora. Post tri jaroj da senriproĉa funkciado, li devas fari novan ekzamenon por ricevi definitivan titolon. Tiu, kiu falas trifojojn ne estas plu instruisto. Apud normala lernejo funkcias ankaŭ lernejo de unua grado por praktikado de la studantoj.

Alian ekzamenon devas trairi vilaĝinstruisto, kiu deziras forlasi vilaĝon por esti instruisto sur loko, poste urba instruisto,

nomita ĉe ni „institutor“, se estas manko de urbaj normalanoj, kies lernejo nun ne ekzistas plu.

Post 35 servjaroj aŭ 65 aĝjaroj la instruisto ricevas tutan pension.

Instruisto estas devigita labori en lernejo 32 horojn semajne. En la libertempo li iras al la preĝejo kun sia ĥoro; instruas gejunulojn; tenas konferencojn; kondukas popolan bankon aŭ ŝparkason, diversajn societojn; kulturas lerneksperimentan teron; plenumas la instruadon de l'posedantoj de l'atestoj de l'unuagrada lernejo; zorgas, ke la amaso legu lernejan bibliotekon; provizas manĝaĵojn por lerneja kantino, kiu ĝin havas, ktp.

Instruisto povas havi nenian alian okupon; ankaŭ li ne povas esti elektika en la regnajn aferojn, aŭ lokteni ian oficon.

Instruisto elirinta el instruado povas reveni nur en la daŭro de du jaroj de eliro; pli malfrue ne.

Instruisto devas partopreni en la jara kunsido por konferenci en la regiona ĉefurbo de 4 ĝis 10 tagoj; same en la kunveno de la kultura rondo por vilaĝanoj, ĉiumonate en alia loko, en unu dimanĉo; tiel same ankaŭ ĉe normala lernejo, kiam la revizoro trovis necesa por plenigi la forgesitajn konojn de l'instruisto, en somera libertempo.

La instruado estas sendependa je klerikuloj; tamen la pastro fariĝas instruisto, se li posedas diplomon de normala lernejo. En tia okazo li ricevas nur duonon da salajro de l'instruisto krom tiu de l'pastro.

*La salajroj.* La instruistinoj havas saman salajron kiel la instruistoj, nome:

| Kategorio: | Monate: | Jare: |
|---|---|---|
| Helpa instruisto vilaĝa | 26 Sm | 312 Sm |
| Vilaĝinstruisto | 34 „ | 408 „ |
| Surloka instruisto | 52 „ | 624 „ |
| Urbinstruisto | 64 „ | 768 „ |
| Instruisto en pli granda urbo ol kun 30.000 loĝantoj | 80 „ | 960 „ |

En la daŭro de servado ĉiuj ricevas aldonon je 10% post 5 jaroj, 20% post 10 jaroj, 30% post 15 jaroj kaj 40% post 20 jaroj ĝis la pensio. Nur la gelernejestroj havas rajton pri la senpaga loĝejo kaj la brulaĵo por la vintro.

Nun instruisto instruas ĝis 80 gelernantojn; sed en la plej multaj vilaĝaj lernejoj la sama instruisto instruas ĝis 80 gelernantojn matene (II—V klasoj) kaj posttagmeze la aliajn ĝis 80 gelernantojn de la unua klaso.

La instruistoj estas starigitaj en siaj pozicioj, sed la revizoroj kaj inspektoroj estas ŝanĝataj laŭ politikaj ŝanĝoj.

## Lernejo kaj instruisto en Saksujo.

De *Felix Uhlmann*, instruisto en Chemnitz (Saksujo-Germanujo).

Kiu en Saksujo volas fariĝi instruisto, devas viziti unu el la seminarioj. Ekzistas 22 seminarioj por viroj, 3 por virinoj, 2 estas konstruataj; ĉiuj estas ŝtataj. La estontaj instruistoj venas plej ofte el la 8klasaj mezaj popollernejoj, kiuj troviĝas en urboj kaj grandaj vilaĝoj, nur malmultaj el la 4- aŭ 6klasaj malaltaj vilaĝlernejoj. En ekzameno (akcept-ekz.) ili devas pruvi skribe kaj parole, ke ili posedas la sciadojn kaj lertecojn, kiujn la popollernejo instruis ilin: Ili devas verki sen ia ajn helpo germanan artikolon pri ia ajn temo, kaj ili devas solvi diversspecajn taskojn el la kalkula kaj geometria instruado. La parola provo etendiĝas pri la ceteraj fakoj de la popollerneja instruado, krom tio pri la latina aŭ franca lingvo. Plie estas tre dezirinde, ke la aspirantoj povas ludi fortepianon kaj violonon kaj povas kanti bone kaj certe. Ĉiuj seminarioj estas internulejoj, la instruado estas senpaga, la lernantoj pagas nur 175 markojn (87. 5 Sm.) por loĝejo, manĝado, ktp. La edukado estas tre severa kaj monaĥeja, la tage libera tempo ne sumiĝas eĉ tri horojn.

Dum la unuaj 3 jaroj la instruado estas nur scienca, en la 4a jaro komencas la profesia informado: La lernantoj estas enkondukataj en la pedagogie-etikajn fakojn, ekzemple psikologio, ĝenerala kaj speciala metodiko, edukadscienco, etiko, krom tio komenciĝas praktikaj ekzercoj instrui infanojn. Tio ĉi okazas tiel, ke la lernantoj grupe vizitas dum kelkaj semajnoj iun ajn fakon en la „seminaria ekzerco-lernejo" kaj parte mem devas instrui. La venontaj instruistoj dediĉas sin ankaŭ al la muziko plej fervore: al la orgeno-, fortepiano- kaj violonludo, al la kantado miksata kaj virĥora. Escepte la kanton estas ja la muzikinstruado laŭvola.

Ĉiun Miĥaelon kaj Paskon estas skribaj provoj, plej ofte pri 2 aŭ 3 fakoj, kiujn antaŭe la lernantoj ne scias. Paske okazas krom tio ankoraŭ parola ekzameno. Kelkaj seminarioj akceptas duoblajn klasojn, en kiuj la lernantoj de la unu devas lerni la latinan, la lernantoj de la alia la francan lingvon, la konforman alian lingvon ili povas lerni laŭvole. — Entute la seminarioj elsendas ĉiujare ĉirkaŭ 600 junajn gekolegojn en la Saksan landon.

La 6 jara studotempo estas fermata por la ekzameno de matureco. Dum 10 tagoj la kandidatoj devas verki pedagogian artikolon kaj lecionon pri religia temo. La skriba ekzameno etendiĝas pri la latina lingvo, realaĵoj, matematiko kaj harmoniosciencco, daŭre po 4 horoj; krom tio ili devas montri, kion ili efektive povas

gimnastike, desegne, kaligrafie kaj muzike. La parola provo daŭras ankaŭ 4 horojn kaj ampleksas ĉiujn ceterajn fakojn. Fine sekvas 2 lecionoj pri religio kaj unu alia fako.

La forlasitaj junaj viroj estas sendataj per la kultministrejo kiel helpinstruistoj al unu distriktinspektoro; tiuj ekzistas en Saksujo 31. Tiu ĉi distribuas ilin en sia distrikto al la oficoj, Paske liberfariĝintaj. Pli antaŭe la ministrejo konsideris la lokon de la seminario aŭ la loĝejo de la rilata helpinstruisto, sed nun ne plie; tial ofte okazas, ke seminariisto el la okcidenta Saksujo fariĝas helpinstruisto en la oriento de sia patrujo; sed tiu ĉi uzo estas pli profito ol malgajno por la juna kolego. Estante estas bedaŭrinde granda manko je la oficoj por helpinstruistoj, ke ofte el 25 aŭ 50 kandidatoj nur 7—10 tuj Paske ricevas okupadon. Mi volas ankoraŭ rimarki, ke la granda parto de junaj kolegoj servas unu jaron en militistaro. — Ankoraŭ en la jaro 1904 estis manko je la instruistoj, ke tiam pli ol 100 lernantoj de la unua (plej supera) klaso seminaria estis sendataj en landon kiel vikarioj. La manko havis sian kaŭzon en la enkonduko de la unujara militista servado; antaŭe la instruistoj estis militistoj nur kelkfoje dum 8 semajnoj. Tro rapida konstruado de novaj seminarioj kaŭzis la nuntempan mankon je la oficoj. Plibonigon alportos certe nur la venonta leĝo pri la popollernejoj, kiu post 2 jaroj estos konsilata en la „Saksa Landtag", nome per plimalgrandiĝo de la klasoj, plimalmultiĝo de la devighoroj instruataj.

La salajro de la helpinstruistoj sumiĝas en unua jaro 450, en dua 500 kaj en lasta (tria) 550 Sm kun libera loĝejo kaj hejtmaterialo aŭ egala monkompensaĵo. La nomita salajro estas la plej malgranda, la urboj kaj grandaj vilaĝoj pagas (plej ofte) iom pli multe. La helpinstruantoj laboras plej ofte ĉe 4- aŭ 6klasaj lernejoj kaj instruas la mezajn klasojn; ili devas instrui 32 horojn. La nombro de la infanoj en la klasoj estas tre diversa, ĝi ŝanceliĝas inter 25 kaj pli ol 60. En ĉiuj distriktoj okazas konferencoj de la helpinstruistoj, prezidataj de la distriktinspektoro aŭ direktoro. En kelkaj regionoj okazas nur 2—3, en la plej multaj 9—10 konferencoj jare. La programo estas jena: leciono, kritiko pri ĝi, priparolado pri pedagogia verko, pri la leĝo por la popollernejoj, fine sekvas praktikaj spertoj. La konferenco daŭras ofte de la dua ĝis la sesa posttagmeze.

Aŭtune de la tria jaro (aŭ la dua, kiu dum la tria jaro devas esti militisto) okazas la dua ekzameno, la ekzameno de kapableco. La kandidatoj devas verki dum 3 semajnoj pedagogian artikolegon kaj lecionon pri religia temo. La skriba provo daŭras

4 horojn kaj etendiĝas je 3 fakoj, kiuj en ĉiu sekcio estas aliaj. Ankaŭ la parola kaj praktika ekzameno similas la ekzamenon de matureco, nur la provantoj postulas pli, precipe pri la pedagogiaj-etikaj fakoj.

Kiu faris plensukcese la duan ekzamenon, povas serĉi oficon kiel definitiva instruanto. La salajro sumiĝas komence 750 Sm, poste po 3 jaroj ĝi pligrandiĝas sesfoje je 100 Sm. kaj dufoje je 75 Sm., tiel ke post 24 servjaroj oni atingas 1500 Sm., krom tio ankoraŭ liberan loĝejon aŭ monkompensaĵon. Ankaŭ tiu ĉi salajro estas la plej malgranda, la urboj kaj grandaj vilaĝoj pagas iom pli, ekzemple la urbo Chemnitz 800—2200 Sm., sed sen libera loĝejo.

## La popola lernejo en Kroatujo.

De *Jos. Anschau*, inspektoro en Osiek (Kroatujo.)

La popola lernejaro en Kroatujo estas aranĝita laŭ la leĝo de 1888.

Por la edukado kaj instruado de junularo ekzistas malplialtaj kaj pli altaj lernejoj.

Malplialtaj lernejoj estas aŭ publikaj komunumaj aŭ konfesiaj aŭ privataj, laŭ tio, ĉu ili estas fonditaj kaj subtenataj de komunumoj, ĉu konfesiaj sektoj, ĉu privatuloj. Instruado en la publika lernejo estas senpaga. La instruadlingvo sin direktas laŭ la plimulto de lernantoj, sed la kroata lingvo estas instruadfako por ĉiuj lernejoj. Planojn por la instruado kaj lernolibrojn ordonas la registaro.

En la fino de ĉiu lernejjaro okazas publika ekzameno, post kiu sekvas dumonata libertempo.

La konstruaĵoj de lernejoj devas stari en loko sana, maĵseka kun ĉambroj lumaj kaj ventumeblaj. Apud ĉiu lernejo estas lerneja ĝardeno por ekzercado pri kulturado de fruktarboj, legomoj kaj floroj, gimnastikejo aŭ almenaŭ ludejo.

La bezonaj benkoj kaj alia lerneja meblaro estas faritaj laŭ la planoj eldonitaj de la registaro.

Kiel helpiloj por la instruado ĉiu lernejo posedas diversajn bildojn, terglobojn, geografian karton, kalkulilon. La instruado en la popola lernejo daŭras kvin jarojn. Poste la infanoj estas devigataj viziti ankoraŭ la ripetadlernejon, kie instruado estas trijara.

Plej multaj estas lernejoj kun unu instruisto, kiu instruas infanojn de 5 diversaj aĝoj. La ofico de tia turmentulo estas tre malfacila.

Ekzistas lernejoj kun 2, 3, 4 kaj pli da personoj. Ĉiu instruisto instruas en aparta ĉambro. La maksimumo por unu instruisto estas 80 infanoj. Se tiu nombro plialtiĝas, stariĝas kiel la dua instruistpersono instruistino por virina manlaboro kaj mastrumaĵo, kio estas utilaj instruadfakoj por knabinoj. Poste laŭbezone ankaŭ la tria, kvara k. t. p.

La instruistoj devas esti samreligiaj kiel la plimulto de lernantoj.

Ĉe la lernejoj kun du aŭ pli multe da instruistoj la registaro nomas unu el ili kiel direktanta instruisto kiu respondas por la ordo kaj progreso de la instituto kaj faras administrativajn laborojn.

La komunumajn lernejojn fondas la komunumoj. La registaro helpas tiun entreprenon, kie mankas la rimedoj. En ĉiu loko kun 40 infanoj, kapablaj por lernejvizitado, oni fondas popolan lernejon.

Malriĉaj lokoj malfermas komune unu lernejon. Krom la salajro apartenas al ĉiu instruisto loĝejo kun bruladlignaĵo kaj ĝardeno, kaj tie, kie ne estas eble, loĝejmono.

Malriĉaj lernantoj ricevas senpage la lernolibrojn kaj aliajn necesaĵojn de la komunumo. La lernejvizitado en Kroatujo estas deviga. La enskribo de infanoj okazas ĉe la apudesto de speciala komisio. Kontraŭ la gepatroj, kiuj ne sendas siajn infanojn en la lernejon, estas uzataj severaj monpunoj.

Koncerne lernejvizitadon regas tamen granda libereco. La gepatroj povas sendi la infanojn kiu ajn lernejon, eĉ ili povas instruadi ilin private, sed en tiu okazo la infano devas fari poste ekzamenon ĉe iu publika lernejo.

## Tria internacia kongreso por la familia edukado de la infano.

okazos en Bruselo la 21.—25. de aŭgusto 1910 *sub la honora prezido de* barono Descamps, ministro de sciencoj kaj artoj; Solvay, ekssenatano, fondinto de la Instituto de socia scienco kaj de la supera komercinstituto en Bruselo; Van den Heuvel, ŝtata ministro; Renkin, membro de la deputatĉambro, ministro de kolonioj; Demot, senatano, urbestro de Bruselo; kaj *sub la prezido de* Leo de Lantsheere, membro de la deputatĉambro, ministro de justeco; Henry Delvaux, eksmembro de la deputatĉambro, provincestro de la provinco Lieĝo; Emile Dupont, ŝtata ministro, vicprezidanto de la senato.

*Ĝenerala sekretariejo:* Rubensstrato 44, Bruselo (Belgujo).

*Celo kaj graveco de la kongreso.* Gepatroj, geprofesoroj kaj agemaj personoj sentas la necesecon kunveni kaj priparoli la gravajn demandojn, kiujn naskas la verko de la edukado.

Unua okazo prezentis sin al ili per la Internacia kongreso en Lieĝo, sub la protekto de la Belga registaro. Oni ricevis 12.000 aliĝojn: 20 fremdaj registaroj estis reprezentitaj ĉe la kongreso. Pli ol 250 specialistoj sendis raportojn, kiuj estis presitaj en 8 volumoj. Du sekcioj starigis internaciajn komitatojn. En la ĝenerala kunveno la delegito de la Asocio de gepatroj el Anglujo proponis kunigi ĉiujn societojn de gepatroj kaj geedukistoj en asocion, kaj delegito de la Granda Duklando Luksemburgo proponis starigi ligilon inter la venontaj kongresoj. Tiuj proponoj kondukis al la fondo de la Internacia komisio de la kongresoj por la familia edukado.

La dua internacia kongreso okazis en Milano en 1906, sub la alta protekto de L. M. reĝo de Italujo; ĝia sukceso ne estis malpli granda ol tiu de la Lieĝa kongreso.

Tria kongreso, sub la oficiala protekto de la Belga registaro, okazos en Bruselo, en 1910, okaze de la tutmonda ekspozicio. Estas superflue insisti pri la graveco de la kongreso sub socia vidpunkto. Kiam oni volas serioze antaŭeniri, tiam oni devas komenci per la edukado en la familio. La plej multaj penadoj de la agemaj personoj restas senfruktaj, ĉar ili komencas tro malfrue; ili provas korekti difektojn, malseverigi mizerojn, rebonigi erarojn. Estus pli logika antaŭiri la nezorgecojn, kiuj kaŭzas tiujn difektojn kaj malhelpi al ili enradikiĝi.

Oni povas esperi, ke tiu tria kongreso direktos ĉiun energion al tiu senco. Ĉiuj sociaj verkoj kaj institucioj pliboniĝus disvastigante sian edukan laboradon unue en la familio. La kongreso kontentigos ĉiujn bonvolojn kaj ĉiujn opiniojn; rilate al la familio la afero ne povas estí alprenigi emojn.

*Regularo por la organizo de la kongreso.* 1. Internacia kongreso de edukado kaj de protektado de la infano en la familio okazos en Bruselo en 1910, okaze de la tutmonda ekspozicio, en la fino de la monato aŭgusto.

2. Estos kvin sekcioj: I. Studado pri la infaneco; II. Edukado de la infaneco: a) ĝeneralaj problemoj; b) edukado de la infano per la gepatroj en la familio; c) kunlaborado de la familio kun la lernejo; d) edukado en la familio post la lernejo; III. Nenormalaj infanoj; IV. Diversaj verkoj, kiuj rilatas al la infaneco; V. Dokumentado.

3. Membroj de la kongreso estas tiuj, kiuj sendos sian aliĝon kaj kotizaĵon da 10 frankoj al la organiza komitato. (Sekretariejo: 44, Rubensstrato, Bruselo, Belgujo)

N. B. Oni nur sendos unu ekzempleron de la raportoj prezentitaj al la kongreso kaj raportoj pri la kunsidoj por ĉiu pagita kotizaĝo. Sed ekzempleroj estos nur liverataj je la prezo en la librovendejo. (La raportoj formos kune 7 – 8 volumojn).

La administracioj, la edukadaj societoj, la protektantaj societoj kaj ĉiuj verkoj povas partopreni en la kongreso kaj sendi delegitojn al ĝi. La kotizaĵo devas esti pagita por ĉiu delegito.

Estas bonfarantaj membroj la personoj, kiuj pagas minimume 50 fr.

4. La kongreso estos direktata de la organiza komisiistaro, kiu konsistos el la prezidantoj kaj la sekretarioj de la sekcioj.

La estraro de tiu komisiistaro estos la estraro de la kongreso; ĝi estos komisiita fari ĉiujn aranĝojn por la preparo kaj funkciado de la kongreso kaj decidi pri ĉiuj okazaĵoj neantaŭviditaj en la regularoj.

La estraroj de la sekcioj faros ĉiujn aranĝojn utilajn por la efektivigo de sia programo.

5. Internacia protektanta komitato prezidos la kongreson. Kiam, en ia federacio, kelkaj personoj estas membroj de la Internacia protektanda komitato, oni povos organizi, inter ili, je la iniciativo de la kongresa estraro, unu aŭ kelkajn specialajn protektantajn komitatojn.

6. En ĉiu lando etas formita nacia komitato, komisiita por la publikigado, la varbado de la membroj kaj de la raportantoj. Tiuj komitatoj provos kolekti monrimedojn por sia propagando.

En la okazo de nesufiĉeco de la monrimedoj ili povas depreni la kostojn de la kotizaĵoj„ kiujn ili alportas. Tiuj kostoj ne povas superi 20% de la kotizaĵoj. Ĉiu komitato elektas prezidanton, kasiston kaj sekretarion.

Tuj kiam grupo da personoj interesiĝas pri la bona sukceso de la kongreso, la estraro povas organizi ilin kiel specialan propagandan komitaton, agadan komitaton, ktp.

Tiuj komitatoj povas interdividiĝi en sekciojn respondantajn kun la sekcioj de la kongreso.

7. Por la raportoj kaj priparoladoj oni uzos la francan, nederlandan, germanan, anglan, italan aŭ hispanan lingvojn. Ĉiu raporto devas esti akompanata de resumo da ne pli ol 20 linioj kaj la parolantoj devas transdoni resumon de siaj paroladoj al la estraro de la sekcioj.

8. La raportantoj devas limiĝi nur klarigi la demandon, konigi la praktikajn rimedojn aplikajn kaj fini per konkludoj aŭ deziroj submetotaj al la kongreso. Ili ne povas enhavi pli ol 5 paĝojn en 8°, tiu estas maksimumo da proksimume 2.000 vortoj. La komunikaĵoj, kiuj ne estas destinitaj por la priparolado, oni povas aldoni al la raportoj pri la kunsidoj, se ili ne superas 1000 vortojn.

La raportoj kaj komunikaĵoj devas doni precipajn bibliografiajn informojn, kiuj koncernas la priparolitan demandon.

La raportantoj estas petataj konservi la originalan manuskripton de siaj raportoj kaj nur sendi tre legeblan kopion (prefere maŝine skribitan).

9. La estraro de la kongreso decidas pri la alpreno de la raportoj kaj komunikaĵoj. Kiam kelkaj raportoj pritraktas la saman demandon, oni povas elekti ĝeneralan raportanton por tiu demando. Ĉio, kio ne rilatos rekte la programon de l' kongreso, estos nepre forigita.

10. Ĉiu diskuto pri la fundo de politika, filozofia aŭ religia demando estas malpermesita.

11. La raportoj, antaŭe presigotaj, devis alveni al la estraro de la internacia kongreso antaŭ la 1-a de decembro 1909. La poste alvenintaj raportoj povas esti legataj aŭ resumataj dum la kunsidoj kaj resume esti enmetitaj en la protokolojn.

La propraĵo de la raportoj kaj decidoj apartenas al la kongreso; la estraro rezervas por si la rajton presigi ilin tute aŭ resume.

12. La deziroj alprenitaj en la sekcioj, estas submetataj al la aprobo de la ĝenerala kunsido. Tiu ĉi alprenos aŭ forĵetos ilin, sen ke oni povas malfermi priparoladon pri ilia enhavo. Ĉiu peto por priparolado en la ĝenerala kunveno estos forĵetita.

### *Programo de la kongreso.*

Organizaj komitatoj de la sekcioj.

N. B. — La raportantoj estas petataj korespondadi kun la sekretarioj de la sekciaj komitatoj.

*I. Sekcio. — Studado pri la infaneco.* Prezidantoj: S-ro Corman, ĝenerala direktoro de la unuagrada instruado ĉe la ministraĵo de Sciencoj kaj Artoj, Bruselo. — S-ro Van Biervliet, profesoro ĉe la universitato, Gento. — Korespondantaj sekretarioj: S-ro Jules Renault, Prekelindenstrato, Woluwo—S-t. Lamberto, Belgujo. S-ro Pol Anri, Gasthuislaan 137, Gento.

1. Studado pri la kvalitoj, difektoj, inklinoj de la infanoj. Novaj observoj, metodoj, praktikaj konkludoj. – 2. Mezuradoj de la korpo. Iloj, metodoj, rezultoj. – 3. Valoro de la diversaj metodoj por determini la lacecon de la spirito. – 4. Fakoj, kiuj plej malmulte lacigas la infanojn. Daŭro de tiuj fakoj; ordo, laŭ kiu la fakoj devas esti instruataj. – 5. Limigo de la kvieteco, kiel en la lernejo tiel en la hejmo, por la diversaj aĝoj. – 6. Konatiĝo de la instruistaro kun la ideoj de la eksperimenta psikologio. Plej praktika formo. — 7. Utilo de la studado pri la infaneco por la gepatroj. Demandaroj, ktp. — 8. Timo ĉe la infanoj (ĝeneralaj enketoj, unuaj kaŭzoj.) — 9. Memmortigo de infanoj (kaŭzoj kaj kuraciloj, enketoj kaj statistikoj, priparolado pri kelkaj okazintaĵoj). — 10. Heredaj difektoj. Rimedoj por malhelpi iliajn malutilajn konsekvencojn. – 10a. Diversaj komunikaĵoj.

*II. Sekcio. — Edukado en la familio.*

*A) Ĝeneralaj demandoj.* Prezidantinoj: S-ino Lucie Felix-Faure-Coyan, 12, Pierre Charron strato, Bruselo. — S-ino de Traux de Wardin, 42, Regentlaan, Bruselo.

Korespondanta sekretario: S-ro Sengers, ĉefinspektoro en Haselto.

11. Neceseco diskonigi precizajn ideojn pri edukado en la familoj, per la organizado de asocioj de gepatroj, la publikigado de broŝuroj, ktp. — 12. Infanludoj, amuzaĵoj kaj plezuroj rilate al la edukado. — 13. Libroj pri edukado. Rezonitaj nomaroj de la plej bonaj albumoj por infanoj de 3 ĝis 7 jaroj; de la plej bone ilustritaj por infanoj 7 ĝis 12 jaraj; de 12 ĝis 16 jaraj; de 16 ĝis 20 jaraj. – 14. Kiel la familio povas kunhelpi al la civila edukado de la junularo. — 14a. Kiel la familio povas kunlabori al la instigo de la mondpaco. – 14b. Kiel la familio povas kunhelpi al la morala edukado. — 15. Kiel la familio povas kunhelpi per la edukado al la etendiĝo ekonomia. — 16. Neceseco de la studado de vivantaj lingvoj. Metodoj. – 17. Studado en la familio de la infanaj inklinoj, pri la malvolviĝo de tiuj ĉi inklinoj rilate al la elekto de profesio. — 18. Higieno kaj beleco de vestaĵaro. – 19. Higieno, komforteco kaj beleco de la loĝejoj, de la meblaro. – 20. La eksterurba familio. Terkultura edukado. Reveno al la kampara vivo. Profitoj de la vivo en la kamparo. — 20a. Diversaj komunikaĵoj.

*B) Edukado antaŭ la lernaĝo.* Prezidantoj: S-ro Velghe, ĝenerala administranto de la higiena fako, ĉe la ministraĵo de terkulturado, Bruselo; — S-ro barono de Royer de Dour, distrikta komisaro, Guimardstrato, 44, Bruselo.

Korespondanta sekretariino: F-ino Van den Plas, 43, Jan Lindenlaan, Bruselo.

21. Nutrado dum la unuaj jaroj. Praktikaj konsiloj. — 22. Vestado dum la unuaj jaroj. — 23. La edukado de la sencorganoj de la junaj infanoj. – 23. Unuaj kutimoj, kiujn oni devas akirigi. 24. Eklernigado de la unuaj kutimoj. – 25. Ludoj, kiuj malvolvigas la kvalitojn de la infanoj. – 26. Lernigaj okupoj por la infanoj. — 27. Malvolvigo de la observa povo. — 28. Malvolvigo de la iniciativo, de la respondeco. – 29. Ordigado de la ĉambro por la infanoj aŭ de la loĝejo rilate al la edukado de la infano. – 30.

Geservistoj, infanistinoj, guvernistinoj. Specialaj edukaj lernejoj por ili. Atestoj pri kapableco. — 30a. Diversaj komunikaĵoj.

*C. Edukado dum la lernaĝo.*

N. B. — La raportantoj stariĝos laŭ la vidpunkto de la kunlaborado de la gepatroj al la lerneja laboro.

Prezidantoj: S-ro Sosset, honora inspektoro de la normalaj lernejoj, Venetiestrato, Elsene (apud Bruselo). — F-ino Linniau, direktorino de normala lernejo, 36, Berlaimontstrato, Bruselo.

Korespondanta sekretariino: F-ino R. Boreux, rue Bovy, 14, Lieĝo.

31. Je kia aĝo la infanoj povas esti senditaj al la lernejo. — 32. Okazoj, en kiuj la gepatroj devas praktikigi hejme la Froebel'ajn regulojn. Okazoj, en kiuj la Froebel'a instruado devas esti donita en la lernejo. Deziroj de la gepatroj koncerne la Froebel'ajn lernejojn. — 33. Mankoj en la lernejo rilate al la edukado. Kiel plenigi tion en la familio. — 34. Deziroj de la gepatroj rilate al la programoj de la lernejoj por knabinoj. Graveco de la instruado de konoj pri infanedukado, higieno, hejma ekonomio kaj de aliaj konoj necesaj en la praktika vivo. — 35. En la okazo, ke edukejo estas necesa por la junulinoj, kiel aranĝi ilin por doni kiel eble plej multe familian kaj praktikan karakteron al ilia edukado. — 36. Deziroj koncerne la formadon de geedukistoj. — 47. Epokoj por ekzamenoj kaj libertempoj, laŭ diversaj regionoj de sama lando. Konsidero kun la kuracistoj. — 38. Kiel oni povas dediĉi pli grandan parton en la lernejo al la karaktero. — 39. La edukado per manlaboro. — 40. Disvolviĝo de la amo al la beleco. — 40a. Diversaj komunikaĵoj.

*D) Edukado post la lernaĝo.*

Prezidantoj: S-ro Prum, deputato en Clervaux, Granda Duklando Luksemburgo. — S-ino grafino Maria de Villermont, Couvin (Belgujo).

Korespondanta sekretario: S-ro Wauters, direktoro de la lernejo por terkultura ekonomio en Bouchout (apud Antverpeno).

41. Plenigaldona edukado donota al la junulinoj por prepari ilin al ilia tasko de edzino kaj patrino. — 42. Preparo de la gefianĉoj al morala kaj spirita kunigo. Konsiloj por eviti malkonsentojn, plifortigi la moralan unuecon kaj certigi la feliĉon de la geedzoj kaj de la familio. — 43. Plenigaldona edukado de la junuloj laŭ socia vidpunkto. — 44. Plenigaldona formado de la amo al la beleco. — 45. Manlaborado en la hejmo por la knaboj. Profito por bonfarto kaj moraleco. — 46. Ĉeestado de edukaj vesper-kunvenoj. — 47. Vojaĝoj, ekskursoj; sekvontaj metodoj. — 48. Edukado al administracia laboro. — 49. Internacia interŝanĝado de infanoj por plifaciligi la studadon de fremdaj lingvoj kaj konigi la morojn kaj kutimojn de iliaj landoj. — 50. Diversaj komunikaĵoj.

*III. Sekcio. — Nenormalaj infanoj.*

Prezidantoj: D-ro Demoor, profesoro ĉe la universitato en Bruselo, 61, Belliardstrato. — S-ro Proost, fondinto de la „Ligue de l' Education familiale“ (Ligo por la familia edukado), 18, rue de l' Arbre Bénit, Bruselo.

Korespondanta sekretario: S-ro Tobie Jonckheere, 36, Waschhuisŝtrato, Bruselo.

51. Ordigo, statistikoj. — 52. Metodo de edukado. Neceseco starigi specialajn edukejojn por nenormalaj infanoj, por maldisciplinemaj infanoj, por kriplaj infanoj, por neprizorgitaj infanoj, por infanoj epilepsiaj. – 53. Preparo kaj formado de specialaj instruistoj por tiuj lernejoj; neceseco de edukad-kuracista kunlaborado. — 54. Kiom kaj kiel oni povas kunlabori en la familio al la edukado de nenormalaj infanoj, antaŭ, dum kaj post la lernaĝo. — 55. Enmiksiĝo de la ŝtato en la edukado de nenormalaj infanoj. – 56. Diversaj informoj.

*IV. — Sekcio. Diversaj verkoj, kiuj rilatas al la juneco*

N. B. – Oni speciale ekzamenos la edukan flankon de tiuj verkoj, la sekvontajn metodojn, ktp.

Prezidantoj: S-ro Dejace, profesoro ĉe la universitato, Lieĝo. — S-ro Campioni, kantona juĝisto, rue du Monastère, Bruselo.

Korespondanta sekretario: S-ro Borginon, advokato, 58, Dupontstrato, Bruselo.

61. Libertempaj restadejoj, liberaeraj lernejoj; verkoj por kuracado per la aero. – 62. Federacioj kontraŭ la tuberklozo. -- 63. Federacioj kontraŭ la malsobreco. – 64. Federacioj por la protektado de la infan-martiroj, de la neprizorgitaj infanoj, de la neleĝaj infanoj, ktp. – 65. Federacioj por la protektado de la unua infaneco; havigado de infanvestaĵaroj; havigado de lakto; infanetejoj, medicinaj advizoj pri suĉinfanoj, ktp. – 66. Infana mutualismo. – 67. Asekuro je la vivo de la infanoj. – 68. Juĝejoj por infanoj. – 69. Diversaj komunikaĵoj.

*V. Sekcio. — Dokumentaro.*

Prezidantoj: S-ro C. Van Overbergh, ĝenerala administranto de la supera instruado ĉe la ministraĵo de Sciencoj kaj Artoj en Bruselo. — S-ro Mabille, administranto de la publika instruado kaj de belartoj ĉe la komunuma administraĵo, Bruselo.

Korespondanta sekretario: S-ro Rouvez, oficejestro ĉe la ministraĵo de Sciencoj kaj Artoj, Bruselo.

Libroj, pedagogiaj revuoj, lernejaj bibliotekoj; popolaj bibliotekoj; publikaj legejoj. – N. B. La biblioteko de la Internacia komisiistaro de edukado, 1, Museumstrato, Bruselo, estos feliĉa ricevi trioble ĉiujn dokumentojn pri edukado.

Raportas *Johano Jacobs*, Antverpeno (Belgujo).

* * *

*En geografia leciono instruisto ordonis al la knabo, ke li citu 3 faktojn pri rivero Rejno. La kleruleto rakontis: „Mi loĝis iam ĉe la bordo de Rejno; mi transveturis Rejnon; mi falis en Rejnon; tio estas faktoj pri Rejno“. -- Oni senkompate trabastonis tiun junan geografiiston, sed ĉu li tion meritis?*

*J. W. Eggleton.*

## La statistika paĝo.

Salajrogradoj de la instruistaro en Nieder-Österreich (Malsupra Aŭstrio), escepte la ĉefurbon Wien. (Laŭ la leĝo de 25. XII. 1904).

| Grado / Signo: laŭ la leĝo de 25. XII 1904. | Grado / Signo: laŭ la instruista skemo | Kategorio | Salajro (jaro): en aŭstriaj kronoj | Salajro (jaro): en spesmiloj | Aldono post ĉiuj 5 jaroj: en aŭstriaj kronoj | Aldono post ĉiuj 5 jaroj: en spesmiloj |
|---|---|---|---|---|---|---|
| I | Ia<br>Ib<br>Ic | Direktoroj kaj instruistoj en burĝalernejoj *I. Klaso.* | 2400<br>2200<br>2000 | 1000<br>916·66<br>833·33 | 200 | 83·33 |
| II | IIa<br>IIb<br>IIc | Direktorinoj kaj instruistinoj en burĝalernejoj *I. Klaso.* | 2200<br>2000<br>1800 | 916·66<br>833·33<br>750·00 | 100 | 41·66 |
| III | IIIa<br>IIIb<br>IIIc<br>IIId | Ĉefinstruistoj kaj instruistoj en popollernejoj *I. Klaso.* | 2200<br>2000<br>1800<br>1600 | 916·66<br>833·33<br>750·00<br>666·66 | 100 | 41·66 |
| IV | IVa<br>IVb<br>IVc | Ĉefinstruistinoj kaj instruistinoj en popollernejoj *I. Klaso* | 2000<br>1800<br>1600 | 833·33<br>750·00<br>666·66 | 100 | 41·66 |
| V | Va<br>Vb | Geinstruistoj en burĝalernejoj. *II. Klaso.* | 1600<br>1400 | 666·66<br>583·33 | Instruist. 200<br>Instr.-inoj 100 | Instruist. 83·33<br>Instr.-inoj 41·66 |
| VI | VI | Geinstruistoj en popollernejoj *II. Klaso.* | 1200 | 500·00 | 100 | 41·66 |
| — | P | Provizoraj geinstruistoj en popollernejoj. *II. Klaso.* | 1000 | 416·66 | — | — |
| — | HL | Instruistinoj por instruado de virinaj manlaboroj en burĝalernejoj. | 400<br>*500<br>*600 | 166·66<br>208·33<br>250·00 | — | — |
| — | HL | Instruistinoj por instruado de virinaj manlaboroj en popollernejoj | 300<br>*400<br>*500 | 125·00<br>166·66<br>208·33 | — | — |

* Plialtigo de l' salajro — por instruistinoj de virinaj manlaboroj — okazas post ĉiuj 10 jaroj.

***Loĝeja kompenso de la instruistaro en Nieder-Österreich, escepte la ĉefurbon Wien.*** (Laŭ la leĝo de 25. XII. 1904.)

Senpagan loĝejon aŭ 30 % loĝkompenson — kalkulatan laŭ la plej malmulta jara salajro de la rilata kategorio — ricevas direktoroj kaj direktorinoj en burĝalernejoj, ĉefinstruistoj kaj ĉefinstruistinoj en lokoj enhavantaj malpli ol 10.000 loĝantoj. En lokoj, enhavantaj 10.000 ĝis 15.000 loĝantojn, la loĝkompenso

estas 500 K (208·33 Sm), en lokoj kun pli ol 15.000 loĝantoj 600 K (250 Sm).

Jaran loĝkompenson ricevas la kategorioj I. ĝis VI., nome:

*A*) la kategorioj I. kaj III. ricevas:

| | | |
|---|---|---|
| en lokoj kun malpli ol 1000 loĝantoj | 160 K | (66·66 Sm) |
| „ „ „ 1.000 ĝis 2.000 „ | 220 K | (91·66 Sm) |
| „ „ „ 2.000 „ 4.000 „ | 280 K | (116·46 Sm) |
| „ „ „ 4·000 „ 6.000 „ | 340 K | (141·66 Sm) |
| „ „ „ 6 000 „ 10.000 „ | 400 K | (166·66 Sm) |
| „ „ „ 10.000 „ 15.000 „ | 500 K | (208·33 Sm) |

En lokoj kun pli ol 15.000 loĝantoj — ankaŭ en la urboj: Baden, Weikersdorf b. B., Vöslau kaj Gainfarn 600 K (250 Sm).

*B)* La kategorioj II. kaj IV. ricevas:

en lokoj kun malpli ol 2.000 loĝantoj 160 K (66·66 Sm).

„ „ „ pli „ 2.000 „ sed malpli ol 5000 loĝ. 200 K (83·33 Sm)

en lokoj kun pli „ 5.000 „ kaj en la urboj: Vöslau kaj Gainfarn 240 K (100 Sm).

*C*) La kategorioj V. kaj VI. ricevas:

en lokoj kun malpli ol 5000 loĝantoj 120 K (50 Sm)

„ „ „ pli „ „ „ kaj en la urboj: Vöslau kaj Gainfarn 180 K (75 Sm).

*Alois Halamasek*, instruisto en Unter-Themenau (Aŭstrio).

## Internacia Asocio de Instruistoj (I. A. I.)

**Protokolo pri la kunvenoj de I. A. I. dum la kongreso en Barcelona.**

La unua kunveno okazis je la 8. septembro ĉe la Paraninfo de la universitato. La kunvenintoj estis malmultaj, ĉar la anonco ne estis sufiĉe konata. Unue prezidis s-ro Durieux el Lille (Francujo), sekretario de I. A. I. kaj poste f-ino Chalmot el Germanujo, vicprezidantino de la sama societo. Estis nomita sekretario de la kunvenoj s-ro Albagés el Vich (Hispanujo). — S-ro Durieux bedaŭras, ke ne povas ĉeesti s-ro Čejka el Moravio, redaktoro de I. P. R., kiu per tiu revuo tiel kuraĝe laboras por nia afero. La ĉeestantoj per aplaŭdoj salutis s-ron Čejka.

F-ino Chalmot proponas, ke la geinstruistoj je la fino de la esperanta kurso povu liverigi diplomojn al la lernantoj, kiuj tion meritas. S-ro Durieux diras, ke li tion faras en Lille kaj promesas sendi diplomojn senpage al tiuj, kiuj ilin petos de li per poŝtkarto.

S-ro Navés el Vich (Hispanujo) diras, ke por pli solenigi la ekzamenojn aliaj esperantistoj el la urbo ĉeestu dum la ekzamenoj.

S-ro Bocou (Francujo) proponas, ke ni devas konigi la infanajn societojn, nomitajn „Juneco“, kiuj povas helpi nin. Ankaŭ, ke ili federaciiĝu, kiam ili estos multaj.

S-ro Durieux petas, ke nia oficiala revuo presigu la regularon de tiuj societoj. Li ankaŭ deziras, ke I. P. R. publikigu la adresojn de la societanoj por faciligi korespondadon kaj rilatojn inter la geinstruistoj*. Ankaŭ esprimas deziron kaj peton al s-ro

* Strange, ĉiu tio ĉi ne okazas en la rubriko »Adresaro por instruistoj«? — Rim. de la red.

Ĉejka, ke la revuo estu pli maldika, por ke ĝi aperu pli ofte, kio estas preferebla por varmigi la entuziasmulojn. Ĉiuj konsentas. S-ro Albagés proponas, ke kiam kaj kie la societo disvanstiĝos, oni nomu malgrandan komitaton ĉe ĉiu nacio anstataŭ nur unu konstantan korespondanton, kiu ne estas sufiĉa por faciligi la troan laboron de la ĝenerala komitato.

La ĉeestantoj interkonsentas fari alian kunvenon esperante, ke ĝi estos pli multenombra por diskuti la proponojn.

*

La 2a kunveno komencis je la 11a de la 10. septembro en la sesa ĉambro de la universitato. Prezidas f-ino Chalmot, kiu estas akompanita de s-roj Durieux kaj Albagés. Ĉeestas ĉirkaŭ 200 instruistoj kaj ankaŭ kelkaj barcelonaj neesperantistaj kolegoj, kiuj deziras saluti siajn fremdajn gekolegojn.

Unue parolas s-ro Montúa, oficiala instruisto el Barcelona, delegito de s-ro Batllés, estro de la instruado en Barcelona, kaj de s-ro López Amo, inspektoro de lernejoj. Li diris resume, ke ambaŭ estroj bedaŭras, ke ili ne povas ĉeesti al la kunveno, sed ili ambaŭ sendas al la kunvenintoj koran saluton. La parolado estis varme aplaŭdita.

S-ro Vernet, ankaŭ oficiala instruisto el Barcelona, kiel direktoro de la profesia revuo „El Clamor del Magistrio“ kaj en la nomo de siaj kolegoj el la urbo, paroladis per hispana lingvo por saluti ĉiujn per kora ĉirkaŭpreno. S-ro Albagés tradukis liajn vortojn, kiuj estis tre aplaŭditaj.

La prezidantino diras, ke la kunveno tre dankas pro tia altestima pruvo de kuneco kaj siavice sendas al la estroj kaj al la kolegoj respektan saluton de ĉiuj.

Poste s-ro Albagés legis la protokolon de la 1-a kunveno, f-ino Chalmot rediris sian proponon pri la diplomoj kaj parolis pri tio s-roj Durieux, Beuves, Nerson kaj Caron el Francujo kaj Ofruse el Nederlando. Oni interkonsentis ne starigi novan diplomon, kiun jam disdonas Internacia Instituto, sed ke la instruistoj, ne la instruantoj havu la rajton disdoni malgrandetan diplomon. La diskutado estis longa kaj fine oni aprobis unuvoĉe tiun ĉi proponon de s-ro Durieux: La instruistoj uzos la plej bonan rimedon por konduki la esperantojn ĉe la lernejoj kaj ĉe la familio. S-ro Albagés parolas pri sia propono kaj diras, ke estas utila, ke la membrokotizaĵo valoru 1·2 Sm t. e. 1 Sm por I. A. I. kaj 0·2 Sm por nacia propagando kaj monŝanĝo.

Je la 1-a postagmeze f-ino Chalmot fermis la kunsidon.

La sekretario de la kunvenoj: *Josefo Albagés.*

P. S. Akceptante inviton de la estroj kaj de la barcelonaj kolegoj la instruistoj, akompanitaj de s-roj Montúa, Llarena kaj Albagés, vizitis kelkajn unuagradajn lernejojn.

*

*Rimarko de la redakcio.* — Post tralego de la protokolo pri barcelonaj kunsidoj, faritaj en la nomo de I. A. I., oni denove povas konstati la strangan fakton, ke la vera celo kaj ankaŭ la programo de I. A. I. estas komprenataj nebone. Nia Asocio estas ja unuiĝo de profesiaj instruistoj de diversaj lernejoj el preskaŭ ĉiuj landoj de la mondo kaj tute ne la unuiĝo de instruantoj de Esperanto. Tial estas preskaŭ ridinde, se oni diskutas ekskluzive la aferojn, kiuj rilatas nur kaj nur instruadon de Esperanto.

Tiu ĉi afero ja apartenas al „Internacia Instituto de Esperanto", sed ne al „Internacia Asocio de Instruistoj!" Ĉar nia Asocio estas unuiĝo de specialistoj, profesiistoj, tial ankaŭ la kunvenoj de I. A. I. estu kunvenoj de specialistoj, instruistoj-profesiistoj kaj membroj de I. A. I. Ĉu ekzemple la esperanta unuiĝo de medicinistoj zorgas kaj diskutas en siaj kunvenoj la aferojn, kiuj apartenas en la regionon de aferoj advokataj, pastraj, muzikistaj, ŝakludistaj ktp.? Ĉu ni instruistoj — sed veraj instruistoj — ne havas sufiĉe da interesa kaj grava materialo, kiu sufiĉus plenigi la programojn de niaj kunvenoj? Kompreneble, pri aferoj instruistaj kaj pedagogiaj ne povas paroli kaj diskuti tiu, kiu ne estas instruisto – li eĉ ne povas bone kompreni la enhavon de paroladoj, kiuj koncernas similajn temojn. Se la kunvenoj de I. A. I. havos ĉiam firman programon kun la temoj, jam antaŭe zorge elektitaj, tiam estos neeble, ke iu parolu pri la afero, kiu ne taŭgas pro sia senco kaj enhavo por la kunveno de instruistoj.

* * *

*Novaj membroj* de I. A. I., kiuj aliĝis de la 21. V. 1909 ĝis la 15. VII. 1910 kaj pagis la kotizaĵon por unu jaro: a) Membroj „propaganduloj" (pagas ĉiujare almenaŭ 4 Sm): 1. Dro Mouton, Francujo (4 Sm); 2. Jacques Camescasse, Francujo (19·75 Sm). – b) Membroj ordinaraj (ĉiujare 1 Sm): 265. prof Minks, Mor., 266. Střelec, Mor., 267. Dro Mulert, Germ., 268. prof. Šváb, Mor., 269. prof. Kasalý, Mor., 270. Pohl, Boh., 271. prof. Fender, Franc., 272. Becker, Germ., 273. Vojtášek, Mor., 274. Debras, Belg., 275. Ogden, Angl., 276. Collingridge de Tourcey, Aŭstralio, 277. Currie, Angl., 278. Weir, Angl., 279. Baxandall, Angl., 280. Whiteley, Angl., 281. Jackson, Angl., 282. Behrendt, Germ., 283. Avdalovič, Hercegovino, 284. frl. Guilliaume, Belg., 285. Lange, Germ., 286. Kořínek, Mor., 287. frl. Grineva, Rus., 288. Hák, Boh., 289. Galič, Kroat., 290. Heilmann, Dan., 291. Režný, Boh., 292. Uitterdijk, Nederl., 293. Pirot, Franc., 294. s-ino Biotto, Ital., 295. prof. Fridrich, Mor., 296. van de Velde, Nederl., 297. Tomič, Stirio, 298. Klenka, Boh., 299. prof. Vlk, Mor., 300. Mareš, Mor., 301. insp. Anschau, Kroat., 302. frl. Korppila, Finl., 303. Saarinen, Finl., 304. Sehnal, Mor., 305. frl. Zatloukalová, Mor., 306. Pfaff, Germ., 307. Braunhoffner, Hung., 308. Le Séac'h, Franc., 309. Poulsen, Dan., 310. Konstantinov, Bulg., 311. Zitzke, Germ., 312. frl. Sheriff, Nova Zealando, 313. prof. Kabanov, Rus., 314. Wahlforss, Finl., 315. prof. Michel, Hisp., 316. Milosavljević, Serb., 317. Hlobil, Mor., 318. frl. Pelikánová, Boh., 319. Punko, Rus., 320. Ciach, Polujo, 321. Dro Naumenko, Rus., 322. frl. Wickelgren, Angl., 323. Popov Hr., Bulg., 324. Walther, Germ., 325. prof. Dro van Rees, Nederl., 326. Mareček, Mor., 327. Špinar, Mor., 328. Uhlmann, Germ., 329. Zajchowski, Galicio, 330. Godziński, Galicio, 331. Wiherlehto, Finl., 332. Vildomec, Mor., 333. Andreev, Bulg., 334. Jesudhasan, Indio, 335. Kostov, Bulg., 336. Marques, Portug., 337. frl. Tarozzi, Ital., 338. Bernardi, Ital., 339. frl. Gasperi, Ital., 340. frl. Nanni, Ital., 341. P. den Hollander, Nederl., 342. Jensen, Dan., 343. Polanskij, Rus., 344. Llarena, Hisp., 345. Barón, Franc., 346. frl. Blin, Franc., 347. frl. Bonnet, Franc.

# Adresaro por instruistoj.

Klarigo de signoj: **L** = lernejo, **I** = instruas, **NL** = kun kolegoj el nacio aŭ lando . . ., **K** = korespondas pri . . ., **D** = donas sciigon pri . . ., **Dez** = speciala deziro. Unu anonco por la membroj de I. A. I. senpage. Nemembroj alsendu 5 respond-kuponojn (por 5 linioj).

9. **Francujo.** SAINT-PAUL-aux-BOIS per Blèrancourt (Aisne). — *J. Bourniche* (franco edzigita je instruistino). **L**: Publika lernejo elementara. **NL**: Gekolegoj ĉiunaciaj. **K**: Pri kio ajn pri la popola instruado. **D**: Ricevi hejme dum ĉirkaŭ 15 tagoj gekolegon germanan, anglan, svisan, bohemian, nederlandan aŭ italan. **Dez**: Pasigi kun mia edzino 2 semajnojn en Germanujo, Svisujo, Nederlando, Bohemujo aŭ Italujo.

10. **Germanujo.** CHEMNITZ, Annabgstr. 427. — *Oskar Melzer* (germano). **L**: Publika lernejo (8 klasoj). **NL**: Gekolegoj eksterlandaj. **K**: Religio, natura historio kaj lernejo. **D**: Pri rilatoj de mia patrujo.

11. **Rusujo Azia.** KIZIL-ARVAT, Zakaspijska. *Miĥail Beregavsky*. **L**: Popola lernejo kun 2 klasoj (5 fakoj). **NL**: Diverslandaj gekolegoj, precipe el Ameriko, Nova Zealando, Aŭstralio, Tasmanio, Afriko. **K**: Pri ĉiuj temoj, ĉefe pri popolinstruado, pri la naturo, moroj, socialismo kaj anarĥismo. **D**: Al tiuj, kiujn interesas Mezazio. Per interŝanĝo de ideoj kaj objektoj, kiuj interesas alilandajn gekolegojn, ekz. papilioj, skaraboj, ŝtonoj, ktp. **Dez**: Ekscii pri la perfektaj rimedoj de morala influo je la animo de lernantoj, por ke ili estu poste efektivaj homoj, sed ne sklavoj.

12. **Usono.** BOSTON (Mass.), Roxbury Latin School. — *Doktoro Lowell, D. O. S.* (anglo). **L**: Alta, klasika, dotita lernejo. **I**: La anglan kaj latinan lingvojn; antikvan historion. **NL**: Gekolegoj el ĉiuj fremdaj landoj. **K**: Pri io ajn, kio interesigas miajn korespondontojn.

13. **Galicio-Aŭstrio.** DLUGOŜYN, poŝto ŜĈAKOVA. — *Teodor Pisiewicz* (polo). **L**: Publika lernejo elementara. **NL**: Gekolegoj slavaj, francaj, oceaniaj kaj japanaj. **K**: Pri vivado de gekolegoj.

14. **Anglujo.** LEATHERHEAD (Surrey), 3, The Crescent. — *Charles W. Shanks* (anglo). **L**: Publika lernejo elementara (7 klasoj). **NL**: Kolegoj anglaj, francaj, germanaj, amerikaj. **K**: Pri muziko, lingvoj, geografio, scienco (elementara). **D**: Vizitantoj al suda Anglujo povas loĝi ĉe mi. **Dez**: Konatiĝi kun la metodoj kaj rimedoj de alilandaj instruistoj kaj alpreni la plej bonajn el ili.

15. **Moravio-Aŭstrio.** HULÍN. — *Hynek Hlobil* (ĉeĥo). **L**: Lernejo elementara. **NL**: Gekolegoj ĉiulandaj. **D**: Interŝanĝas skarabojn kaj papiliojn de centra Eŭropo por la samaj el aliaj partoj de la mondo.

16. **Belgujo.** ANTWERPEN, Cuylitsstr. 72. — *Johano Jacobs* (flandro). **L**: Publika lernejo elementara. **NL**: Gekolegoj ĉiulandaj. **K**: Pri aferoj lernejaj, precipe pri la organizado de la instruado kaj pri la movado de la instruistaro kaj la salajroj de instruistoj. **D**: Faciligi vojaĝon en Belgujo per utilaj informoj. **Dez**: Kolekti ilustr. poŝtkartojn de karakterizaj kostumoj, tipoj, metioj, ktp.

Redaktoro kaj eldonanto Theodor Čejka, Bystřice-Hostýn. — Presejo »Družstvo knihtiskárny«, Hranice, Moravio.

zetoj esperantaj, por kiuj helpa lingvo internacia estas ne nur rimedo, sed ankaŭ celo kaj ili certe volonte dediĉos al lingvaj demandoj kaj disputoj tiom da loko, kiom estos bezone. Nia revuo, do tute ne zorgos pri la demandoj helplingvaj, sed ĝi estos ĉiam gazeto profesia, redaktata en Esperanto.

*Th. Čejka.*

**„Telefono" de la redakcio.** Kara kolego, vi certe miras, ke nur ĝis nun — post interrompo pli longa ol unu jaro — aperas la tria kajero de I. P. R., sed vi eble ne scias, kial tiuj kajeroj ne estas jam pli multenombraj. La ĉefa kaŭzo — krom kelkaj aliaj, kiuj estas en efektiveco ne tiel gravaj, ke ili povus malhelpi la prosperadon de I. P. R. — estas preskaŭ nekredebla indiferenteco de niaj kolegoj rilate kunlaboradon. Kaj tamen ĉiu ja scias, ke bona gazeto ne povas ekzisti sen bonaj kaj konstantaj kunlaborantoj. La 2 aperintaj kajeroj de I. P. R. estis akceptitaj ĉie kun granda entuziasmo kaj mi ricevis multe, tre multe da laŭdaj leteroj pri la enhavo, kiun oni trovis tre interesa... Sed ĉu tio ĉi sufiĉas por eldoni almenaŭ simile interesajn kajerojn ankaŭ estonte? Mi scias, ke laŭdoj estas bona rimedo por plifervorigi aŭ pligojigi la pluan laboradon, sed tiu rimedo estas tute senutila, se la redaktoro ne ricevas samtempe ankaŭ materialon por kajeroj venontaj Por esti justa, mi devas konfesi, ke mi ricevis multe da promesoj pri alsendo de diversaj artikoloj por I. P. R. Sed ĉu mi povas kunmeti eĉ unu bonan kaj interesan numeron de la revuo el tiuj belaj kaj multaj promesoj? Vi scias, ke sur la tuta tero ekzistas eĉ ne unu redaktoro, kiu povus fari tion kaj vi certe scias, ke ankaŭ mi ne estas tia kapabliulo . . Jes, mi eble povus kunmeti kelke da numeroj de nia revuo el diversaj sciigoj, kiujn mi legas en niaj gazetoj naciaj — sed ĉu internacia gazeto estus vere internacia, se ĝi estus redaktata „nacie", t. e. nur de unu naciano? Ĉu ĝi estus vere interesa por la publiko internacia? Mi ne bezonas respondi ĉi tiun demandon Kion mi celas per tiuj ĉi plendoj? Mi bezonas vian kunhelpon kaj mi estas certa, ke vi ne rifuzos mian peton, kiun mi faras en la nomo de nia I. A. I. kaj I. P. R. — ne por mi mem, sed por nia komuna afero. — Se nia revuo havos almenaŭ 20 efektivajn kaj konstantajn kunlaborantojn el diversaj nacioj, kiuj anstataŭ promesoj sendos al la redaktoro 20 artikolojn, nia revuo povos aperadi regule kaj kun enhavo ĉiam interesa. — Por kunlabori en I. P. R. vi ne bezonas esti literaturisto aŭ »scienc-verkisto«, sufiĉas, se vi havas bonan volon elserĉi en viaj naciaj gazetoj pedagogiaj aŭ profesiaj (instruistaj) internacie interesan artikoleton, kiun vi bezonas nur simple esperantigi. Se vi trovos en via gazeto ankaŭ kelke da malgrandaj interesaj sciigoj aŭ statistikoj, aldonu ilin al via artikolo kaj vi faris por nia afero bonegan servon, por kiu dankos al vi multaj kolegoj en ĉiuj partoj de la mondo. Ekzemple, ĉu ne estus interese legi el ĉiuj landoj similajn artikoletojn, kiel estas artikoletoj »La instruado en Nederlando« aŭ »La instruisto en Danujo«? Sufiĉas nur imiti unu el tiuj artikoloj kaj aldoni, kio en via lando estas alia. Kiu sentas sin pli kapabla, verku memstare artikoleton pri la temo, kiu ŝajnas al li plej taŭga por nia revuo, kies programo estas jam bone videbla el kajeroj, kiuj

ĝis nun aperis. — La kvara kajero de I. P. R. eliros en septembro aŭ plej malfrue en oktobro kaj estos la lasta en la I. jarkolekto. — La duan jaron ni komencos tuj poste kaj se niaj membroj plenumos la malgrandan peton, kiun oni povos legi en la 4a kajero, la revuo aperados en la nova jaro pli ofte, t. e. dumonate kaj regule.

* * *

**La kotizaĵon sendu al la kasisto** (Th. Čejka, Bystřice-Hostýn, Moravio, Aŭstrio) aŭ per 10 poŝtaj »respond-kuponoj« (Coupon-Réponse International), kiuj estas riceveblaj en ĉiu poŝtoficejo (sed ĉiu kupono devas esti stampita per poŝta stampilo, ĉar alie la kupono estas senvalora!) aŭ per poŝta mandato. Se oni skribas la sumon sur la poŝta mandato, oni skribu ĉiam tiel: **2 K 50 h** (en aŭstriaj kronoj, ĉar alie la kastisto ricevas diversajn sumojn, kiuj estas plej ofte pli malgrandaj ol 1 Sm kaj la preciza kalkulado estas neebla).

# Bibliografio.

La redakcio ricevis la sekvantajn librojn (la ne ricevitajn librojn oni ne povas anonci): **Emile Boirac**: Plena Vortaro Esperanto-Esperanta kaj Esperanto-Franca. 2 volumoj, 344 pĝ., granda formato, 9 frankoj, Presejo Darantiere, Dijon. — **V. A. Jung**: Mluvnice jazyka anglického pro školy a samouky. 349 pĝ., granda formato, 6·10 K. Librejo Hejda & Tuček, Praha. — **Dr. J. Kvačala**: Protestantische gelehrte Polemik gegen Campanella vor seiner Haftentlassung. Jurjev 1909, I Mk. Analecta Comeniana. Collegit Joannes Kvačala. Jurievi 1909, 5 Mk. Prielomy vo viere Komenského a Mickiewicza. Petrohrad, 4 Mk. **René de Saussure**: La geometrio de »folietoj« aŭ Geometrio folietara. 71 pĝ., Ĝenevo 1909, 1·00 Sm. Presejo Alb. Kündig. — **M. R. Bricard**: Sur la géométrie des feuillets de M. René de Saussure. Étude analytique. Extrait des »Nouvelles Annales de Mathématiques, 1910. — **Santiago Rusiñol**: Folioj de la Vívo. Trad. Alf. Sabadell, Barcelona (J. Espasa é Hijos), 1909, 106 pĝ., 1 peseta. — **F. Burnettová**: Malá miss. Librejo Hejda & Tuček, Praha. — **Prof. Lederer**: Esperantista poŝkalendaro 1910, Berlin (Esper. Verlag Möller et Borel), 0·80 Mk. — **Th. Dr. Fr. Loskot**: Konrad Waldhauser. Praha (Volná Myšlenka), 1909, 1·50 K, — **Edm. Privat**: Ĉe l'koro de Eŭropo. Ĝenevo (Eldonejo Atar), 1909. — **K. Bláha**: Všeobecné dějiny stenografie, Praha (Čes. lidové knihkupectví), 1909, 1·20 K. — **Carmen Sylva**: La vizio de la Poeto. London (Centra Angla Esperantejo), 1909. — **St. Tomič**: La vojo al vero. Paris 1910 (Presa Esper. Societo), 1 fr. — **Dro Corret**: Raporto pri la 5-a kongreso de Esper., Paris (Presa Esper. Societo), 0·75 fr. — **Török P.**: Porĉiama kalendaro. Debreczen, 1910, 20 Sd. — **T. E. K. A. - Jarlibro 1910**; Koetzschenbroda-Dresden (H. F. A. Thalwitzer), 0·4 Sm. — **J. Poruks**: La Vakciniuja Krono, Paris (Presa Esper. Societo), 0·50 fr. — **Edwin Greene**: Sing me to sleep, London (Phillips et Page), Esperanta eldono.